

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Mireille Grosjean

Luigia Oberrauch Madella

Ahmad Reza Mamduhi

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj

de la aktuala numero:

Ivan Eidt Colling

Renato Corsetti

Nina Danylyuk

Federico Gobbo

Mireille Grosjean

Byelongo Elisée Isheloke

Stefano Keller

Katalin Kováts

Stefan MacGill

Alessandra Madella

Vicente Manzano-Arrondo

Sébastien Moret

Martin Ptasiński

A. Giridhar Rao

Spomenka Štímeč



ENHAVO

Enkonduko (Mireille GROSJEAN)	3
Sébastien MORET: <i>Kelkaj pripensoj pri la venko de Esperanto</i>	4
Mireille GROSJEAN: <i>Planeda pripensoj</i>	17
A. Giridhar RAO: <i>Plurlingva edukado en Barato: taskoj kaj defioj</i>	23
Mireille GROSJEAN: <i>Ĉu dezirinda kvara povo?</i>	27
A. MADELLA: <i>Savu la planedon kun la nova Esp-a stelulo: kungfua kuniklito</i>	30
<i>Problemo kun la Multlingva Akcelilo (MLA)[...]</i> (Mireille GROSJEAN)	34
ILEI-ESF-UEA-Laborgrupo pri Esperanto kaj Universitato (R. CORSETTI k.a.) ...	36
Nina DANYLYUK: Interlingvistiko kaj esperantologio en la universitata Esperanto-centro en Ukrainio	40
Federico GOBBO: <i>Ses difinoj serĉantaj fakon: interlingvistiko en la nova jarmilo</i>	48
Anoncoj	48
Omaĝe al Zlatko Tišljar – Pajo (1945-2020) (Spomenka ŠTIMEC)	51
Informoj pri ILEI, redakciaj informoj	53

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 79 69 709 66. Kunordiganto de la estrara laboro. Eksteraj rilatoj (UNESKO, FIPLV kaj aliaj). Informado pri la Ligo. Observanto de ILEI en la estraro de UEA kaj Komitatano A ĉe UEA. Eldonado de la du revuoj de ILEI.

Vicprezidanto: Ivan COLLING, DEPAC/UFPR, Ed. Dom Pedro I, Rua Gal. Carneiro, 560, Primeiro. Andar, Centro, BR-80060-150, Curitiba, PR, Brazilo. <iecolling@yahoo.com.br>. Eldonado de la Manlibro pri Instruado de Esperanto

Sekretario: Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. fiksa: (+7) 8352-648531, portebla: (+7) 919-670-25-34. <lena_espero@mail.ru>.

Estrarano pri financaj aferoj: William HARRIS „Vilĉjo”, 4 Edgecomb Ct, Portland ME 04013, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.

Vic-prizorganto de financaj aferoj: Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio, Tel. poŝ.: (+374) 055-27-99-06. <karinko_arm@mail.ru>

Estrarano: JUNG Yuro „Unika”, 101, Bonuru-Musashi, 9-11, Asahicyou 3, Kawagoe, Saitama JP-3501126, Japanio. Tel. poŝ.: (+81) 70-5569-6771. <yurjun@st.amu.edu.pl>. Reta komunikado, kongresaj aferoj, TEJO.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. hejma (+381) 32 371053. <radojica.petrovic.rs@gmail.com>. Universitata agado, Eŭropa komisiono de UEA, AEDE.

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,

Usono, University of Hartford;

AdE¹

Membroj:

Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah

Renato Corsetti, Britio/Italio, Università degli Studi di Roma „La Sapienza”; AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, emerita profesoro de LRU, Indian Statistical Institute, Kolkata; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Iona Koutny, Pollando/ Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu

Stefan MacGill, Nov-Zelando/ Hungario

Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения, AdE¹

Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA Nyelvtudományi Intézet

¹ AdE – Akademio de Esperanto

Sur la eksteraj kovrilpaĝoj:

Edinburgo, nia kongresa urbo en 2021. Nia kongreso estos hibrida, do ĉiunmaniere vi povos partopreni!

Enkonduko

Karaj legantoj,

De la 15-a ĝis la 30-a de oktobro 2020 okazis en la Komitato de ILEI voĉdono pri kvar variantoj por plibonigi la financon situacion de la Ligo. Tiu voĉdono venis post trisemajna debatafazo, kie aperis novaj sugestoj kaj farmanieroj. Mi dankas ĉiujn, kiuj partoprenis.

Kutime, se la voĉdono proponas aprobon de raporto, ĉio iras glate kaj aperas unuanimeco aŭ situacio ne for de unuanimeco. En la nuna kazo okazis io tute alia. De la komenco ni povis observi, ke la varianto 1, nuna stato sen modifoj, do kun defecito, interesas neniu; ĝi ne ricevis eĉ unu voĉon. La varianto 3 proponis altigon de kotizoj, ne etan altigon de kotizoj; ĝi ne ricevis eĉ unu voĉon. Do la konkurado okazis inter la varianto 2 ioma altigo de kotizoj, kaj la varianto 4 laŭ propono de membroj: malkresko de la servoj al la membroj, tio estas aperigo de nur du paperaj numeroj de IPR en la jaro, la kvar numeroj aperu rete. Plie en tiu varianto venu diversaj komunikoj per diversaj retaj rimedoj. La lukto daŭris ĝis la lasta vespero, la lasta horo... Kaj la fina rezulto estas: 18 voĉoj por la varianto 2 kaj 18 voĉoj por la varianto 4. Do egaleco. Post noktomezo, do post la fino de la voĉdonperiodo, alvenis al mia poŝtkesto reta du voĉoj pliaj, malfruaj: unu por la varianto 2 kaj unu por la varianto 4!

Mi notas la landokodon, la nomon de la komitatano kaj lia/ŝia voĉo. Mi havas la kutimon skani aŭ foti la dokumenton kaj konservi ĝin en mia komputilo kun la dokumentoj pri tiu voĉdono, nun numero 05 de 2020.

Laŭ la kutimo en Svislando, mia lando, en kazo de egaleco, decidus la prezidanto. Mi iras al tiu farmaniero, ĉar mi trovis nenion en nia statuto kaj regularoj. Plie mi apogas min sur la voĉoj de la estraranoj: kvin el ili voĉdonis, du voĉdonis por la varianto 4 kaj tri voĉdonis por la varianto 2, do la varianto 2 konkretiĝos.

Do jen la validaj kotizoj por la jaro 2021 (en EUR):

A-landoj kun papera IPR	A-landoj kun reta IPR	B-landoj kun papera IPR	B-landoj kun reta IPR	A-landoj Supera membro	B-landoj supera membro
25	12,50	12,50	6,25	40	22,50

Superaj membroj ricevas nian organon *IPR* kaj nian revuon *Juna Amiko* papere.

Ni abonu kaj diskonigu nian revuon *Juna Amiko*!

Surpapera varianto de la revuo JA kostas A-lande €18; B-lande €13.

Reta varianto de JA kostas A-lande 11 EUR, B-lande 7 EUR.

La sugestoj, kiuj aperis dum la debato, estas bonaj kaj trafaj. Ni certe konsideros ilin estontece. Tamen, se ni ekrilatas rete kun niaj membroj tra la jaro, ni ne povas trafi kelkajn, kiuj ne uzas la reton. Tio estas realo, ni komputilemuloj ne rajtas forgesi ilin. Pro tio mi petas la sekciestrojn prepari por jarfino membroliston kun siaj membroj kaj la retadresoj de ili. Tiel ni povos havi klaran bildon de tiu aspekto. Tiuj tabeloj iru al ilei.officejo@googlemail.com

Mireille GROSJEAN
Prez de ILEI


Kelkaj pripensoj pri la venko de Esperanto

de Sébastien MORET, Universitato de Laŭzano, Svislando



Kial venkis Esperanto? Kial Esperanto sukcesis akceptigi sin? Ĉi tio estas ne nur la temo, sed ankaŭ la titolo de almenaŭ tri studoj, tri tekstoj, publikigitaj, la unuaj, komence de la jaroj 1930-aj, kaj, la plej freŝdata, en 1979.

Laŭ mia scio, la unua studo pri la temo estas rusa teksto, publikigita en Moskvo en 1930, kun la titolo *Počemu pobedil jazyk Èsperanto?* [Kial la lingvo Esperanto venkis?] (Žirkov 1930). Ĝia aŭtoro estis la sovetia lingvisto Lev Ĵirkov (1885-1963), kiu estas konata ĉefe kiel specialisto de la lingvoj kaŭkazaj kaj iranaj. Paranteze, lia intereso pri Esperanto estas tre malbone konata. Unu jaron poste, en 1931, la studo de Ĵirkov estis tradukita en Esperanton kaj publikigita en Leipzig (Germanio) fare de la eldonejo Ekrelo, kiu estis tre aktiva en la jaroj 1920-1930, kaj dank' al kiu estis publikigitaj pluraj gravaj tekstoj en Esperanto. La teksto de Ĵirkov bone respregulas la etoson de lia epoko, kelkfoje kun kontraŭ-burĝa retoriko, tute tipa por la sovetia tempo, sed kiu ne malpliigas la intereson pri la pensoj de Ĵirkov. Jen, ekzemple, kion li diris pri la volapukistoj, la adeptoj de la lingvo Volapük (1879-1880), kreita de Johann Martin Schleyer (1831-1912): „Kiuj estis volapükistoj laŭ ilia socia deveno? [...] Videble, la ĉefa bazo konsistis el riĉuloj, entuziasmiĝintaj pri „la ideo”, sed ne zorgantaj pri iu praktika bezono” (Ĵirkov 1931: 12).



Kelkajn jarojn poste, alia artikolo kun la sama titolo aperis en la dua volumo de la *Enciklopedio de Esperanto* (Enciklopedio 1933-1935, vol. II: 286-288). Tiu ĉi enciklopedio publikigita inter 1933 kaj 1935 en Budapeŝto, fare de la eldonisto de la revuo *Literatura Mondo*, estis realigita sekve de la iniciato de la rusa esperantisto Ivan Gennadjeviĉ Ŝirjaev (1877-1933) kaj estis la tria klopodo post 1913 kaj 1917 kunigi la maksimumon da informoj eblaj rilate al la esperantista movado (pri la historio de la Esperantaj enciklopedioj, vidu Kuznecov 1993). Oni trovas do tie publikaĵeron vortumitan „Kial venkis Esperanto?”, en kiu estas kunigitaj tri mallongaj tekstoj de tri diversaj aŭtoroj, kiuj ĉiuj provas klarigi la sukceson de Esperanto. Krom eta paragrafo kun resumo de la ideoj de Lev Ĵirkov esprimitaj en lia menciita studo, ĉi tiun publikaĵeron konsistigas teksto de Ernest Drezen (1892-1937), la unua kaj la sola prezidanto de la sovetiaj esperantistoj, teoriisto de Esperanto kaj aŭtoro, komence de la 1930-aj jaroj, de la fama *Historio de la Mondolingvo* (Drezen 1991), kaj de teksto de Lajos Tárkony (alinome: Ludoviko Totsche, 1902-1978), hungara esperantisto, kiu tradukis en Esperanton plurajn hungarajn aŭtorojn kaj kiu koniĝis pro siaj fajnaj kritikoj de la originalaj literaturaj verkoj en Esperanto.

Por fini mian liston, oni devis atendi proksimume kvardek jarojn, laŭ miaj konoj, antaŭ ol vidi la aperon de teksto kun la sama titolo. En 1979, la franca revuo *Critique* dediĉis specialan numeron al la „Mito de la universala lingvo”, en kiu estas publikigita artikolo de la franca filozofo Jean-Claude Michéa (Michéa 1979). Malgraŭ sia simbola titolo en Esperanto, la artikolo de Michéa estas en la franca.

Apud ĉi tiuj tri tekstoj, kiuj ricevis la saman titolon, necesas precizigi ankaŭ tion, ke pluraj aliaj sciencaj verkoj pri Esperanto kaj la artefaritaj lingvoj ĝenerale traktas la temon de la venko de Esperanto. La plej lasta tia verko estas la interesa studo de Roberto Garvía, titolita *Esperanto and its rivals* [Esperanto kaj ĝiaj rivaloj] (Garvía 2015), kiu klarigas la sukceson de Esperanto - inter la planlingvoj - baziĝante sur la organizaj strategioj de Zamenhof. Ĉar jes, la sukceso de Esperanto estas defio. Eĉ se ni devas konstati ke tiu sukceso estas relativa, kiel pri tio atentigis jam komence de la jaroj 1930-aj Lev Ĵirkov:

„Ĉu ĝi jam estas enkondukita kiel helpa lingvo por internacia afera komunikado? – Ne! – Ĉu oni jam instruas pri ĝi iom vaste en lernejoj? – Ne! – Ĉu oni povas helpo de ĝi esti komprenata ĉie dum vojaĝo? – Ne kaj ne!

Ĝi estas ankoraŭ preskaŭ nenie oficiale akceptita, ĝi preskaŭ nenie eniris lernejon, esti komprenata helpo de ĝi dum vojaĝoj oni povas nur meze de esperantistoj, kiujn oni devas scii kiel trovi.” (Ĵirkov 1931: 7)

Do, la respondoj de Ĵirkov al ĉiuj tiuj demandoj estas neaj. Kaj hodiaŭ, preskaŭ unu jarcenton post tiuj frazoj, la situacio ne vere ŝanĝiĝis. Tamen, hodiaŭ, samkiel hieraŭ, oni povas paroli nur pri la sukceso de Esperanto, ĉar jes – kaj ĉi tie mi reprenas esprimon de la fama franca lingvisto Antoine Meillet (1866-1936) – „Esperanto funkciis” (Meillet 1918: 324), kaj daŭre funkcias. Kaj ĝia sukceso mezureblas en la propra kunteksto de la planlingva historio, kiel menciis la hungara esperantisto Totsche en sia teksteto por la *Enciklopedio de Esperanto*: „[Esperanto] estas vivanta, dum ĝiaj rivaloj mortis antaŭ ol vere ekvivi” (Enciklopedio 1933-1935, vol. II: 286).

En 1990, Aleksandr Duliĉenko publikigis verkon (Duliĉenko 1990), en kiu li listigis, preskaŭ komplete, ĉiujn projektojn planlingvajn, kiuj aperis en la historio de la homaro, ekde la pli fruaj provoj, kiel la projekto *lingua ignota* de la sanktulino Hildegarde von Bingen en la mezepoko, aŭ la revojo de Descartes aŭ Leibniz pri filozofia lingvo, ĝis dekoj da projektoj de artefaritaj lingvoj aperintaj en la 19-a jarcento, kiu ja estis la jarcento de la artefaritaj lingvoj. La rezulto impresas: ekde la 2-a jarcento post Jesuo Kristo ĝis la 1970-aj jaroj, kiam Duliĉenko haltis, temas pri listo de preskaŭ 900

projektoj aŭ provoj krei artefaritan lingvon. Ekde tiam, precipe sekve de la apero kaj evoluo de la interreto (pri la planlingvoj en/de la interreta epoko, vidu Barandovská-Frank 2006), certe ekzistas jam milo da lingvoj, naskiĝintaj el la imago aŭ revoj de diversaj personoj. Inter tiu milo da provoj, la lingvoj kiuj efektive ne nur diskoniĝis, sed ĉefe eliris el siaj manlibroj aŭ broŝuroj de prezentado por esti reale uzataj parole kaj skribe, tiuj lingvoj, aŭ pli ekzakte, tiuj projektoj kiuj iĝis lingvoj – por transpreni esprimon de la germana interlingvisto Detlev Blanke (1941-2016, *vd la foton*) (Blanke 2006) – nombrebblas per la fingroj de la du manoj. Apud Esperanto, oni devas mencii Volapük-on de J. M. Schleyer, kiun la historiistoj pri artefaritaj lingvoj konsideras kiel la unuan projekton, kiu reale iĝis lingvo kun komunumo de parolantoj, gazetaro, periodaĵoj kaj kongresoj (Couturat, Leau 1903: 142-143); sed ankaŭ Ido-n (1907), kiun la esperantista historiografio prezentas kiel aperon perfidan kaj skisman (Korĵenkov 2005: 44-49), la lingvon Occidental-Interlingue (1922) de la estona Edgar de Wahl (1867-1948), aŭ ankoraŭ Interlingua-n de IALA (*International Auxiliary Language Association*) en la 1950-aj jaroj (pri tiuj lingvoj, vidu ekzemple Albani, Buonarroti 2001; Couturat, Leau 1903; Drezen 1991; Duliĉenko 1990). El la milo da projektoj efektive imagitaj, estas nur eta deko da provoj, kiuj iĝis veraj lingvoj. Kaj inter tiuj, kompreneble, troviĝas Esperanto.



Jen do la unua etapo de la sukceso de Esperanto, eliri kiel la manlibro de la internacia lingvo de Doktoro Esperanto, por iĝi la lingvo, kiu estas uzata ankoraŭ hodiaŭ. Mi diris „unua etapo”, ĉar la sukceso de Esperanto mezuriĝas ankaŭ je alia nivelo.

Se ni komparas Esperanton kun la aliaj lingvoj, pri kiuj mi ĵus parolis, kaj kiuj same eliris el la projekta stato por iĝi veraj lingvoj, ni konstatas ke, el sociolingvistika vidpunkto, nur Esperanto proksimiĝis al la sociolingvistika nivelo de la naturaj lingvoj, eĉ atingis ĝin. Mi referencas ankoraŭfoje al la esploroj de D. Blanke (Blanke 2006). Laŭ li, ne sufiĉas klasigi la artefaritajn lingvojn laŭ ties formalaj strukturoj, kiel oni longe faris reprenante la distingon inter lingvoj artefaritaj *a posteriori*, *a priori* kaj miksitaj, popularigita komence de la 20-a jarcento fare de Louis Couturat (1868-1914) kaj Léopold Leau (1868-1943) (Couturat, Leau 1903: 27-28)¹. Blanke

¹ Por Couturat kaj Leau (1903: 27), reprenante ideon de Gaston Moch (1859-1935), la artefaritaj lingvoj aprioraj estis lingvoj „kiuj pro diversaj kialoj tute ne konsideras la naturajn lingvojn, kaj kiuj estas originalaj lingvoj, komplete konstruitaj”;

proponis analizi kaj klasigi la artefaritajn lingvojn laŭ la roloj, kiujn ili okupas en la reala komunikado. Tiel li alvenis al la distingo inter lingvoj kaj lingvo-projektoj. Pri tio mi jam diris kelkajn vortojn. Se ni sekvas la klasigon proponitan de Blanke, kaj la 28 kriteriojn, kiujn li konsideras, ni konstatos, ke nur Esperanto plenumas tiujn 28 kriteriojn, kiuj, laŭ Blanke, difinas la progreson kaj sociolingvistikan evoluon de artefarita lingvo. Tiel eblas diri pri Esperanto, ke ĝi ne restis en la stato de manuskripto, ĉar manlibro de Esperanto ja estis publikigita en 1887. Ekde tiu unua manlibro, aliaj instruiloj aperis, kaj propagando estis komencita. Gazetaro kaj privata korespondado disvolviĝis. Sekve, Esperanto kreis sian originalan literaturon, komunumon de siaj parolantoj, ĝi estis uzata por verkoj aŭ artikoloj sciencaj; kaj post diskuto pri la formala strukturo de la lingvo, normo estis kreita kaj aperis referenclibroj. Iom post iom Esperanto iĝis studobjekto de la scienco, kiun eblas nomi interlingvistiko, aŭ, pli precize, esperantologio; ĝi iĝis la intima lingvo de kunuloj aŭ de familioj, ĝi iĝis, kiel tion montris la esploroj de Aleksandr Melnikov (*vd dekstre*) en Rusio (Melnikov 2007) aŭ de Zbigniew Galor (1952-2017, *vd maldekstre*) en Pollando (Galor 1997), la portanto de originala kulturo, kun siaj mitoj kaj esprimoj, kulturaj referencoj, siaj anekdotoj, siaj frazeologiaĵoj (vidu Fiedler 1999). Kaj se oni aldonas al tio la fakton, ke, sekve de ĝia uzo praktika en larĝa kampo, Esperanto evoluis kaj pluevoluas sur vojojn ne nur neantaŭviditajn, sed ankaŭ kaj ĉefe neplanitajn (Piron 1989; Lo Jacomo 1981), tiam oni povos konstati, ke Esperanto iĝis, por tiel diri, se oni ne konsideras ĝian originon klare ne-naturan, natura lingvo, ĉu el vidpunkto de serio da sociolingvistikaj karakterizaĵoj aŭ el la vidpunkto de ĝia funkciado (Koutny 2015). Tie estas la venko plej granda de Esperanto.



Kaj nun, ĉu eblas klarigi tiun venkon objektivite? Ĉu eblas apliki al tio klarajn kialojn, definitivajn kaj nepridubeblajn? La repondo estas certe „ne”, la venko de Esperanto ne estas klarigebla unu fojon por ĉiam. La tri tekstoj titolitaj „Kial venkis Esperanto?”, pri kiuj mi parolis komence, estas la pruvo mem pri tio, ĉar la kvar aŭtoroj, kiuj laboris pri la demando, ne, aŭ malofte, prezentas la samajn argumentojn. Drezon mencias ekzemple la fakton, ke Esperanto naskiĝis en Rusio, „lando ĝis tiutempe neniagrade tuŝita de la

koncerne la lingvojn aposteriorajn, kiuj konsideras „kiel modelojn la naturajn lingvojn (ĉefe la eŭropajn), strebas imiti ilin kaj uzas preskaŭ ĉiujn iliajn elementojn.” Apud ili, la miksaj sistemoj „inspiriĝas de ambaŭ principoj”.

ĝenerala mondlingva propagando kaj ankaŭ en relativa malgranda grado tuŝita de la propagando de Volapük” (Enciklopedio 1933-1935, vol. II: 287); laŭ Drezen, tio permesis, ke „dum nuraj 2 jaroj post apero de la unua libro, en Rusujo jam estis varbitaj 1000 E-istoj – nombro sufiĉa por ke la lingvo int[ernacia] ekkresku” (*samloke*). Li priatentas ankaŭ la personecon de Zamenhof, ties „praktikismo[n]”, kiu faris, ke Zamenhof „tre lerte kaj antaŭvideme [...] aranĝis la propagadon de E[speranto] eldonante la lernolibrojn samtempe en ĉiuj plej gravaj eŭropaj lingvoj kaj malavare dissendante ilin tra la tuta terglobo” (*samloke*); sed ankaŭ kaj ĉefe la fakto, ke Zamenhof, „estante mem produkto de politike kaj nacie premita regiono de la rusa Polujo, kvazaŭ koncentris en sia rusa menso la tutan energion kaj persiston, pri kiu nur povis revii la minoritata loĝanto de la iama rusa imperio”, kaj „fordonis dum jaroj sian tempon kaj monon por propagandi la novan lingvon kaj diskonigi ĝin” (*samloke*).

Ĵirkov ŝajne pli okupiĝas pri la pruvoj koncerne la venkon de Esperanto, anstataŭ pri la kialoj de ĝia sukceso. Li rimarkas tiel, ke Esperanto restis vivanta, evoluis, eĉ se post ĝi aperis lingvoprojektoj „multe pli bonaj en detaloj kaj konsekvencaj laŭ lingva tipo”: „Sed Esperanto malgraŭ tio daŭris stari, ne falis, kaj al neniuj redonis sian venkon” (Ĵirkov 1931: 7-8). Simile, alia pruvo de la Esperanta venko, post la unua Mondmilito, „la movado disiĝis laŭ la sama limlinio, laŭ kiu disiĝis ĉio en la mondo – laŭ la linio, limiganta inter burĝa kaj laborista movadoj” (*samloke*). Laŭ Ĵirkov, tio montras, ke Esperanto iĝis vivanta lingvo:

„Se Esperanto estus morta, neviva afero, ĝi ne reflektus tiun ĉi tutmondan disiĝon. Se ĝi reflektis tiun gravegan fakton, tio signifas, ke Esperanto jam fariĝis ilo taŭga por batalado. Tio signifas, ke Esperanto finis la periodon de sia kreado, kaj komencis la epokon de sia vivo.” (Ĵirkov 1931: 8)

Ankaŭ por Jean-Claude Michéa (*vd dekstre*), tiu „surpriza kapablo [de la esperantista movado] fidele respeguli la konfliktojn de la epoko” estas „la ĉefa signo de [ĝia] vivkapablo” (Michéa 1979: 670). Alia interesa ideo de la franca filozofo, kiu estas samtempe pruvo kaj kialo de la sukceso de Esperanto, referencas al la diversaj konfliktoj, ĉu ideologiaj ĉu lingvaj, kiuj ĉeestas en la historio de Esperanto. Por J.-Cl. Michéa, ĉiu societo, kia ajn ĝi estu, ne povas ekzisti sen la ĉeesto de konfliktoj (Michéa 1979: 669), kaj ĉi tiuj internaj konfliktoj permesis al Esperanto kaj ĝia movado iĝi tio, kio ili estas hodiaŭ: „Oni devas do akcepti ke [...] tiuj kontraŭdiroj kaj luktoj funkciis, kiel mekanismo samtempe



unuiganta kaj strukturanta [...]. En tiu senco, ĝia kapablo de senĉesa dividiĝo politika [...] estas ja por la esperantista movado la resumo [*condensé*] praktika de la kialoj de ĝia sukceso” (*samloke*: 672).

El mia vidpunkto, la venko de Esperanto estas la kuniĝo de tuta serio da faktoroj, kaj *lingvistikaj* kaj *pragmataj* kaj *konjunkturaj*. Tiun ĉi aron de faktoroj mi provos nun prezenti laŭeble plej klare, prezentante la diversajn elementojn, kiuj ŝajnas al mi la plej trafaj.

Ni komencu per la lingva nivelo. Ĉi-teme indas diri ke, malgraŭ tio, kion oni povis legi kelkfoje, Esperanto ne venkis pro tio, ĉar se ĝi estus „perfekta”. Zamenhof ne imagis lingvan perfektecon. Li mem konsciis pri tio, skribante: „Mi tute ne pretendas, ke la lingvo, kiun mi proponas, estas lingvo perfekta” (D^{ro} Esperanto 1887: 31). Se Esperanto estintus lingva sistemo perfekta, ĝi ne kaŭzintus ĉiujn diskutojn pri sia formo, kiuj karakterizis ĝiajn unuajn jarojn, se ĝi estintus perfekta, oni ne riproĉintus al Zamenhof liajn korelativojn „tute artefaritajn” (Yushmanov 1924: 124) kaj arbitrajn, oni ne riproĉintus al li ties akuzativon, ties supersignojn kaj ĉion alian, pri kio li devis sin esprimi kaj kion li devis pravigi en siaj famaj *Lingvaj respondoj* komence de la 20-a jarcento (Zamenhof 1962). Fine, se Zamenhof estintus ideala kreanto, ĉu aperintus la diversaj projektoj de artefarita internacia lingvo, kiuj aperis post Esperanto? La respondo ankaŭ tie estas „ne”, kiu montras al ni, ke Esperanto ne estas perfekta lingvo. Aliflanke, ni ne forgesu, ke perfekta lingvo estas mito, tamen oni ankaŭ povus diri, ke ekzistas tiom da perfektaj lingvoj, kiom da aŭtoroj de artefaritaj lingvoj (pri la ideo pri perfekta lingvo, vidu Eco 1994).

Sed, malgraŭ ĉio, oni devas mencii ĉe Zamenhof, same je la lingva nivelo, intuiciojn aŭ elektojn, kiuj sendube povis kontribui al la venko de Esperanto. Inter tiuj, mi ŝatus unue citi Ĵirkov, kiu rimarkas la gravecon de la pretiga laboro farita de Zamenhof:

„Por krei artefaritan lingvon li laboradis ankoraŭ dum la jaroj, kiam li estis gimnaziano. En la momento de publikigo, post pli ol dek-jara laborado, la lingva sistemo, kreita de li, estis tiom pripensita, tiom harmonie konstruita en ĉiuj siaj partoj, ke ĝi estis plene konforma kaj oportuna por ĉiuj bezonoj de homa lingva agado, simple komunikanta aŭ eĉ literatura.” (Ĵirkov 1931: 13)

Dank’ al tiu pretiga laboro, Esperanto estis ekde la komenco preta je uzo, sekve „oni povis tuj komenci paroli kaj skribi pri ĉio, pri kio oni volis” (*samloke*).

Inter la kialoj de la sukceso, absolute necesas mencii la elekton de la lingva strukturo de Esperanto. La lingvistoj nomas ĝin aglutina, Zamenhof, en la unua manlibro, parolis pri la „plena dismembrigo de la ideoj en memstarajn vortojn” (Zamenhof 1887 [1954: 234]). Se diri alimaniere, Esperanto estas strukture kiel konstruludo, en kiu ĉiu briko enhavas ĉiam nur unu kaj la saman sencon. Kaj sufiĉas kombini tiujn diversajn brikojn por esprimi ne nur la sencon, sed ankaŭ la deziratajn nuancojn. Zamenhof komprenis la avantaĝon de la aldono de prefiksoj kaj sufiksoj:

„[M]i enportis grandegan ekonomion rilate la nombron de la vortoj ellernotaj, ne sole ne deprenante per tio ĉi de la lingvo ĝian riĉecon, sed kontraŭe, farante la lingvon – dank’ al la eblo krei el unu vorto multajn aliajn kaj esprimi ĉiujn eblajn nuancojn de la penso – pli riĉa ol la plej riĉaj naturaj lingvoj. Tion ĉi mi atingis per la enkonduko de diversaj prefiksoj kaj sufiksoj, per kies helpo ĉiu povas el unu vorto formi diversajn aliajn vortojn, ne bezonante ilin lerni. (Pro oportuneco al tiuj ĉi prefiksoj kaj sufiksoj estas donita la signifo de memstaraj vortoj, kaj kiel tiaj ili estas lokitaj en la vortaro.)” (Zamenhof 1887 [1954: 232-233])

Apud tiu aglutina strukturo, kiu permesas havi lingvon sen esceptoj kaj riĉan vortfaradon, devas esti menciitaj ankaŭ, kiel favoraj faktoroj, la leksikaj elektoj de Zamenhof, eĉ se iuj lingvistoj riproĉis al li, prave, ĉi-rilate mankon de rigoro kaj de konstanteco. Tiel, la lingvisto kaj interlingvisto sovetia Nikolaj Juŝmanov (1896-1946) ne komprenis, kial Zamenhof, kiu mem tiujn vortojn kreis, eliminis el la vortoj *bukedo* kaj *cigaredo* la vorteron (morfemon) diminutivan, do signifantan malgrandecon, {-et-}, sed ne faris tiel pri la vortoj *sekreto* aŭ *alumeto* (Yushmanov 1924: 131).

Malgraŭ la kritikoj kaj riproĉoj fareblaj al Zamenhof, kion ni devas konsideri el la farmaniero, laŭ kiu Zamenhof kreis la leksikon (vortojn, vorterojn) de Esperanto, estas lia volo konsideri la vortojn, kiuj aperas, pli-malpli samforme, en la plej granda nombro de lingvoj. Post enlistigo, tiuj vortoj estis enmetitaj en la Esperantan leksikon, en formo laŭeble malplej modifitaj kaj plej rekoneblaj, tiel signife faciligante la lernadon de la vortprovizo. Jen tio, kion Ĵirkov skribis pri tiu temo:

„La provizo de fundamentaj radikoj estas ĉerpita el la komuna vortprovizo, kiu fariĝis jam internacia en la landoj de eŭropa kulturo. Tiamaniere ĉe la ellernado de la lingvo Esperanto la granda parto de vortoj klariĝas kiel jam konata de lernanto, se li konas komunajn kulturajn terminojn.” (Ĵirkov 1931: 14)

Eblus aldoni al ĉi tiu listo de favoraj lingvistikaj elementoj la mankon de kompleta deklinacio, kaj ĉefe la konjugacion simpligitan ĝis esenca minimumo, sed tie mi haltigas la traktadon el lingvistika vidpunkto.

Mi ŝatus nun mencii kelkajn pragmatajn kialojn kiuj, laŭ mi, kontribuis al la sukceso de Esperanto. La unua estas la fakto, ke Zamenhof, ekde la komenco, rifuzis esti la majstro, la aŭtoritato kuratora de Esperanto. Male okazis kun Schleyer, la kreinto de Volapük, kiu sin konsideris la „templogardisto” kaj aŭtoro de projekto prilaborita kaj finita por ĉiam; Zamenhof, ekde la komenco, konsideris sin nur la „iniciatoro” (kaj ne la „kreinto”) de Esperanto (Zamenhof 1888 [1929: 26]), kiel tiu, kiu lasis la prijuĝon de sia verko al la samepokanoj, atendante konsilojn:

„Tial, antaŭ la publikigo de vortaro kompleta kaj komenci publikigi librojn kaj gazetojn, mi prezentas mian verkon, dum unu jaro, por la aprobo bonvola de la publiko, min turnante al ĉiuj kleraj homoj, kun la peto bonvole komuniki al mi ilian opinion pri la nova lingvo, kiun mi proponas. Ĉiu, kiu havos objekton, bonvolu informi min, skribe, pri la modifoj, kiujn li juĝus utila fari.” (D^o Esperanto 1887: 32)²

Tiel agante, Zamenhof lasis la pordon malfermita al plibonigoj kaj al ioma malrigideco, por ke rezulte lia projekto plaĉu al la plimulto de la homoj. Same ĝusta kaj grava, el mia vidpunkto, estas la publikigo en la unua manlibro de serio da praktikaj ekzemploj de uzo de la lingvo: ni ja vidis, ke Zamenhof tie prezentis ne nur ekzemplon de letero, sed ankaŭ tradukaĵojn, kiel ero el la Biblio kaj poemo de Heinrich Heine, sed ankaŭ unu originalan poemon (Zamenhof 1887: 22-26). Zamenhof pruvis tiel al siaj legantoj la realecon de la lingvo Esperanto kaj ĝian veran ekziston, se oni volentis ĝin kiel komunikilon. Ion similan diris la hungara esperantisto Totsche en sia teksto, destinita al la *Enciklopedio de Esperanto*: kiam la plimulto de aliaj projektoj de internacia lingvo „klopodis kapti unuavice la sciencajn rondojn”, „E[speranto] elektis kiel ĉefan agadkampon la literaturon” (Enciklopedio 1933-1935, vol. II: 286). Tiu fakto aperis grava por la evoluo de la lingvo kaj de la movado:

² Laŭ mia scio, la lasta parto – pri la problemo „Trovi rimedojn por venki la indiferentecon de la mondo” (Zamenhof 1887 [1954: 231]) – de la enkonduko, kiun Zamenhof skribis en diversaj eŭropaj lingvoj por la unua manlibro de Esperanto, neniam aperis Esperantlingve. Sekve, la ĉi-supra citaĵo ne estas originala Esperantlingva zamenhofaĵo, sed traduko el la franclingva teksto de Zamenhof (Zamenhof 1887).

„[L]a literaturo estas komuninteresa, povas altiri vastajn rondojn, ebligas eldoni komence malgrandajn librojn (do ne necesas granda kapitalo kaj risko), kaj poste, post la eduko de l' legantaro per varbforto al inteligentaj larĝaj socitavoloj povas aperi iom post iom pli ampleksaj, pli altnivelaj verkoj, dum al la simpluloj servas libroj simplaj kaj facilaj.” (samloke: 287)

Simile, la eta aliĝilo, kiun Zamenhof inkludigis ĉe la fino de sia unua manlibro, kaj per kiu la unuaj adeptoj de la lingvo listigis sin, permesis la kreiĝon de la unuaj kontaktoj, kaj sekve de la unuaj grupoj, kaj do la realan praktikan uzon de la lingvo. Necesas precizigi, ke la ideo kompili la nomojn de la interesiĝintaj personoj jam ekzistis ĉe la volapükistoj (vidu ekzemple Rozenberger *et al.* 1887).

Fine, inter tiuj pragmataj kialoj, mi ŝatus paroli pri la fakto, ke Zamenhof neniam volis nur krei lingvon. Malantaŭ lia lingvo estis, kiel ni scias, celo, revo multe pli granda (la esperantistaro parolas pri la „interna ideo”): unuigi la homojn en paco kaj konkordo, kiam ili ĉiuj uzos komunan lingvon. Esperanto do strebis, antaŭ ĉio kaj ĉefe, al konkreta praktika celo. Jean-Claude Michéa notis, ke „la deviga akcepto de ideologia flanko specifa kaj ligita al la uzo de lia lingvo funkciis iom simile, kiel socia kontrakto de la zamenhofa komunumo” (Michéa 1979: 666). Ĉi tiu unua celo, tiu praktika atingendaĵo por iom da tempo unuigis la esperantistojn kaj tenis ilin fore de tro da diskutoj kaj pripensadoj teoriaj (*samloke*), lasante tiel al la lingvo tempon por enradikiĝi, kiel ĝi estis. Jen, kion diris Zamenhof en 1907 okaze de la Universala Kongreso en Londono:

„Multajn fojojn mi ripetis, kaj en Bulonjo mi tion ĉi proklamis per oficiala deklaro, ke la esperantismo celas nur al tio, ke ia taŭga kaj vivipova komprenilo inter la popoloj ekzistu, sed ke la formo de tiu komprenilo estas por ni – aŭ almenaŭ por mi persone – tute indiferenta; ke se, anstataŭ fari konstantajn kaj senfinajn eksperimentojn kaj teorian rezonadon, ni decidis elekti la pretan kaj elprovan lingvon Esperanto kaj labori speciale kaj ekskluzive por ĝi, kaj fiksi por ĝi netuŝeblan fundamenton – ni faris tion ĉi ne ĉar al ni plaĉas speciale Zamenhof kaj lia verko, kaj ne tial, ke li volas esti ia papo, kiel mensoge kredigas diversaj niaj kontraŭuloj – sed nur tial, ke la esploro kaj sperto montris al ni, ke tia maniero de agado estas la sola, kiu plej certe alkondukos nin al nia celo.” (Zamenhof 1907 [1929: 381-382])

Same por Totsche, la ekzisto de la „interna ideo” ludis gravan rolon en la venko de Esperanto: „Ĉi tiu idealisma flanko mankis ĉe aliaj lingvoprojektoj: tiuj akcentis nur la praktikajn avantaĝojn de la int[ernacia] lingvo, do altiris nur la danĝerajn lingvistamatorojn”, kiuj nur emis reformi la lingvon kaj

„kiuj sur la kampo de int[ernacia] lingvo intencis travivi siajn inklinojn” (Enciklopedio 1933-1935, vol. 2: 286).

La celo de la esperantistoj estas havi komunikilon inter la popoloj cele al la realigo de idealo, kaj ties formo ne tre gravas. Esperanto estas tie, tia, kia ĝi estas, ĝi ne estas perfekta, sed ĝi funkcias. Kaj tio estas la pli grava, pli ol scii tion, ĉu devis esti akuzativo aŭ supersignoj. Ĉi-teme, estos interese signali tion, ke ankaŭ Ĵirkov opiniis ke tiu manko de interesiĝo teoria pri la lingva strukturo de Esperanto permesis savi la ekziston mem de la lingvo, speciale okaze de la skismo idista en la jaroj 1907-1908. Dum „[l]a unuaj rusaj propagandistoj de Esperanto ĉiuj estis homoj ideologie riĉaj, kiuj klopodis krei idean fundamenton de la movado” (Ĵirkov 1931: 17), la esperantistoj de la periodo, dum kiu okazis la idista skismo, antaŭ ĉio, diras al ni Ĵirkov, estis „kompatindaj kolektistoj de poŝtmarkoj” (*samløke*), karakteriĝis je „neagema senideeco” (*samløke*); tiuj homoj „prenis kun ĝojo la simplan gramatikon de Esperanto, kaj sen teoriaj ĉikanoj komencis uzi ĝin” (*samløke*). Laŭ Ĵirkov, tio estis tre grava por la movado kaj por la venko de Esperanto:

„Tio estis treege grava fakto ĝuste de la lingvosciencia vidpunkto. Unuafoje inter esperantistoj, eĉ unuafoje en la historio de artefaritaj lingvoj, aperis centra bazo, kiu konsistis el personoj, ne pridiskutantaj tiun artefaritan lingvon, pere de kiu ili parolas.” (Ĵirkov 1931: 17)

Esperanto aperis post Volapük, en la momento, kiam tiu lasta vivis sian gloran horon, kun tute respektinda nombro de parolantoj, kluboj, organizaĵoj kaj publikaĵoj. Tiu historia hazardo estas parto de tio, kion mi nomus la kialoj konjunkturaj, kiuj favoris la venkon de Esperanto, ĉar la fakto, ke Esperanto iĝis la dua lingvo artefarita, kiun oni praktike uzis post Volapük, havas sian gravecon. Fakte, la unuaj adeptoj de Esperanto havis antaŭ la okuloj la pioniran ekzemplon de Volapük, kio ne signifis por ili malpli ol tio, ke estis eble por artefarite prilaborita lingvo iĝi komunikilo, kiel eblis al iu alia. Volapük iusence rompis la barilojn de antaŭjuĝoj ĉirkaŭintaj tiam la ideon mem de artefarita lingvo (pri tiuj antaŭjuĝoj, vidu Moret 2004). Aliflanke, Volapük funkciis ankaŭ kiel kontraŭ-ekzemplo pri tio, kion oni ne devus fari se oni volus la sukceson de artefarita lingvo. Mi ŝatus ĉi-rilate memori la vortojn de Zamenhof, kiuj estas sur la kovrilpaĝo de la unua manlibro el 1887: „Por ke lingvo estu universala – ne sufiĉas nomi ĝin tia” (D^{ro} Esperanto 1887). Antaŭe mi parolis pri la fakto ke Schleyer, la kreinto de Volapük, ĉiam konsideris sin kiel la majstron de sia lingvo, kiu sola povis decidi la vojon sekvotan de ties evoluo. Male al tio, Zamenhof malfermis la diskutojn,

sin esprimis pri siaj elektoj, kaj post iom da tempo, li deklaris la lingvan debaton fermita. Koncerne la elekton de la vortoj, Volapük povas ankaŭ esti konsiderata kiel inversa kopio de Esperanto: se Zamenhof decidis enpreni en la vortprovizon de Esperanto la internaciajn vortojn en ties plej rekonebla formo, Schleyer, kontraŭe, difinis kompleksajn kaj devigajn regulojn por la leksika kreado (Couturat, Leau 1903: 152-154) kaj decidis resti je tio je ĉiu prezo, tiome, ke plejparte preskaŭ ne eblis rekonii la originan vorton. Ĉi tiu citaĵo de Auguste Kerckhoffs (1835-1903), unu el la plej famaj volapükistoj francaj, estas signifa: „Koncerne la konservadon pli-malpli fidelan de la radika formo, tiel kiel ĝi estis en la natura lingvo, ni ne devas tion konsideri grava” (Kerckhoffs citita en Couturat, Leau 1903: 155). Por ekzemplo, ni rediru, ke „Volapük” estis vorto kunmetita el *world* + *speak*, alivorte „monda lingvo”. Fronte al la nomo ne travidebla de Volapük, Ĵirkov ŝatis substreki, ke „[l]a vorto „Esperanto” en la lingvo Esperanto mem estas komprenebla” (Ĵirkov 1931: 13). Same, la gramatiko komplika kaj vasta de Volapük (tri genroj, kvar kazoj, pluraj modoj) funkciis kiel repuŝilo – oni scias, ke pluraj volapükistoj forlasis Volapük-on kaj aliĝis al Esperanto – pro la multe pli facila kaj efika gramatiko de Esperanto. Tiel, el mia vidpunkto, la cirkonstancoj, kiuj naskis Esperanton en iu momento, kiam alia artefarita lingvo, t.e. Volapük, havis ian sukceson, ludis rolon favore al la sukceso de Esperanto.

En 2018, ĵus celebrinte la 100-jaran datrevenon de la forpaso de Zamenhof, baldaŭ 131 jarojn post la publikigado de la unua manlibro, Esperanto ne forgesiĝis, ĝi estas daŭre parolata, transdoniĝas ankaŭ kiel denaska lingvo, estas studata en universitatoj, kunigas homojn el ĉiuj partoj de la mondo, produktas literaturon. La listo povus esti ankoraŭ longa por pruvi, ke ankoraŭ hodiaŭ oni daŭre povas paroli pri la venko de Esperanto.

(El la franclingva originalo esperantigis Stefano KELLER)

Literaturo

- ALBANI Paolo, BUONARROTI Berlinghiero, 2001: *Dictionnaire des langues imaginaires*. Paris: Les Belles Lettres, 2001
- BARANDOVSKÁ-FRANK Vera, 2006: „Internaciaj lingvoj en interreto”, en P. G. Borbone, A. Mengozzi, M. Tosco (A cura di), *Loquentes linguis. Studi linguistici e orientali in onore di Fabrizio A. Pennacchetti*. Wiesbaden: Otto Harrassowitz Verlag, 2006, p. 51-62
- BLANKE Detlev, 2006: „Vom Entwurf zur Sprache”, en D. Blanke, *Interlinguistische Beiträge. Zum Wesen und zur Funktion internationaler Plansprachen*. Frankfurt am Main [etc.]: Peter Lang, 2006, p. 49-98

- COUTURAT Louis, LEAU Léopold, 1903: *Histoire de la langue universelle*. Paris: Hachette et C^{ie}, 1903
- DREZEN Ernest, 1991: *Historio de la Mondolingvo. Tri jarcentoj da serĉado*. Moskvo: Progreso, 1991
- D^{RO} ESPERANTO [= L.L. Zamenhof], 1887: *Langue internationale. Préface et manuel complet*. Varsovie: Gebethner et Wolff, 1887.
- DULIČENKO Aleksandr Dmitrievič, 1990: *Meždunarodnye vspomogatel'nye jazyki*. Tallinn: Valgus, 1990 [La internaciaj helpaj lingvoj]
- ECO Umberto, 1994: *La recherche de la langue parfaite*. Paris: Seuil, 1994
- ENCIKLOPEDIO, 1933-1935: *Enciklopedio de Esperanto*, 2 volumoj. Budapest: Literatura Mondo, 1933-1935
- FIEDLER Sabine, 1999: „Phraseology in Planned Languages”, en *Language Problems & Language Planning*, 1999, vol. 23, n° 2, p. 175-187
- GALOR Zbigniew, 1997: „Esperanto-movado kaj ĝia kulturo, kelkaj sociologiaj rimarkoj”, en I. Koutny, M. Kovács (red.), *Struktura kaj socilingvistika esploro de Esperanto*, Budapest: Steleto & ILEI, 1997, p. 103-106
- GARVÍA Roberto, 2015: *Esperanto and Its Rivals. The Struggle for an International Language*. Philadelphia: University of Pennsylvania Press, 2015
- ĴIRKOV Lev, 1931: *Kial venkis Esperanto?*. Leipzig: Ekrelo, 1931
- KORĴENKOV Aleksander, 2005: *Historio de Esperanto*. Kaliningrado: Sezonoj
- KOUTNY Ilona, 2015: „A typological description of Esperanto as a natural language”, en *Język. Komunikacja. Informacja*, 10/2015, p. 43-62
- KUZNECOV Sergej, 1993: „El la historio de Esperanto-enciklopedioj: ANA kaj ties aŭtoro. Editoro enkonduko”, en V.F. Szmurlo, *Ariadna fadeno. Universala Alfabeto Nomaro-Adresaro (ANA)*. Moskvo: Impeto; Ruthenia, 1993, p. 3-20
- LO JACOMO François, 1981: *Liberté ou autorité dans l'évolution de l'espéranto*. Paris: François Lo Jacomo, 1981
- MEILLET Antoine, 1918: *Les langues dans l'Europe nouvelle*. Paris: Payot, 1918
- MELNIKOV Aleksandro S., 2007: *Esperanto – lingvo de kulturo kaj personeco*. Poznań – Moskvo – Rostov-na-Donu: Eŭropa Jura Universitato „Justo”, 2007
- MICHÉA Jean-Claude, 1979: „Kial venkis Esperanto?”, in *Critique*, août-septembre 1979, n° 387-388, p. 661-673
- MORET Sébastien, 2004: „D'un vice caché vers une nouvelle conception de la langue: les langues artificielles et la linguistique”, en *Cahiers Ferdinand de Saussure*, 2004, vol. 57, p. 7-21
- PIRON Claude, 1989: „A few notes on the evolution of Esperanto”, en K. Schubert (ed.), *Interlinguistics. Aspects of the Science of Planned Languages*. Berlin – New York: Mouton de Gruyter, 1989, p. 129-142
- ROZENBERGER [V. K.], SOBOLEV [A. I.], XOLIN [I. P.], 1887: *Spisok lic v Rossii [...] znajuščix volapjuk, s ix adresami*. [Sankt-Peterburg] [Liste des personnes en Russie qui savent le volapük, avec leurs adresses]
- YUSHMANOV Nik, 1924: „100 fundamental defekti di Esperanto”, en *Mondo*, Mayo-Junio 1924, n° 5-6 (159-160), p. 119-134 [100 fundamentaj misoj de Eo]

- ZAMENHOF Ludwik Lejzer, 1887 [1954]: „El la unua libro de la lingvo Esperanto”, en *Fundamenta krestomatio de la lingvo Esperanto de D-ro L.L. Zamenhof*. Rickmansworth: The Esperanto Publishing Company Limited, 1954, p. 228-239
- _____, 1888 [1929]: „Antaŭparolo al la ‘Dua Libro de l’ lingvo Internacia” en L. L. Zamenhof, *Originala verkaro*. Leipzig: Ferdinand Hirt & Sohn, 1929, p. 21-29
- _____, 1907 [1929]: „Parolado en la Guildhall de Londono, 21. Aŭg. 1907”, en L. L. Zamenhof, *Originala verkaro*. Leipzig: Ferdinand Hirt & Sohn, 1929, p. 381-383
- _____, 1962: *Lingvaj respondoj*. Marmande: Esperantaj Francaj Eldonoj, 1962
- ŽIRKOV Lev, 1930: *Počemu pobedil jazyk Ĕsperanto?*. Moskva: CK SĔSR, 1930 [Kial venkis la lingvo Eo?]

Planeda pripenso

Inaŭgura malferma parolado de Mireille GROSJEAN en la 53-a Virtuala Esperanto-Konferenco de ILEI la 25-an de julio 2020

Kutime en kongresoj okazas NACIA VESPERO. Estas momento, kiam ni povas malkovri ion de la kulturo de la gastiganta lando. Jam ni gustumis novajn lokajn pladojn, jam ni sentis la temperaturon kaj humidecon, do ni flaris la klimaton, jam ni vizitis valorajn monumentojn aŭ muzeojn, jam ni povis paroli kun la lokaj esperantistoj. Okaze de tiu vespero nomita „nacia” la Loka Kongresa Komitato venigis dancgrupojn, muzik-orkestrojn, korusojn, severe elektis ilin por montri al la partoprenantoj tion, kio estas la plej belaj kulturaj spektakloj. La organizantoj volas plezurigi la partoprenantojn, esperas, ke ili povos fieri, se la publiko ŝatas la vesperon. Estas grava momento, ni povas tiam plonĝi en la gastigantan landon, malkovri kelkajn artajn aspektojn de ĝi, kaj la lokaj esperantistoj povas klarigi pri la spektaklo, fieri pri ĝi, kaj senti feliĉon, kiam la gastoj esprimas admiron.

Kaj nun?

Ĉiu estas hejme. Ni ne vojaĝis, ni ne atingis novan lokon. Ni sidas en nia kutima ĉirkaŭaĵo. Ni eĉ sidas en tre kutima loko: ĉe nia labortablo, kie staras nia komputilo. Kaj tiu ilo ligas nin al.... la tuta mondo.

Nia gastiganta loko estas la tuta mondo.

Nun en Eŭropo estas la fino de la posttagmezo. En aliaj lokoj matenas, en aliaj lokoj vesperas. Do ni ne povas paroli pri vespero por ĉiuj. La vorton vespero ni devas forstreki. La vorton nacia ni devas forstreki.

Ni pripensu pri nia Planedo, la Planedo TERO. Ĉu ni ligiĝas al ĝi same forte, kiel ni ligiĝas al nia hejma lando, al nia patrujo? Ĉu ni konas ĝin same bone, kiel ni konas nian propran landon?

Ni ĉiuj estas planedanoj, do iu el ni povas klarigi pri ĝi al alia persono. Ne estas la nocio Vi indiĝeno kaj Mi fremdulo. Ni ĉiuj estas indiĝenoj sur la Planedo Tero. Iuj el Marso estus fremduloj... kaze ke ili ekzistas.... Tamen ĉu nia percepto de nia Planedo samas, se ni naskiĝis en kongolanda strato aŭ en usona strato aŭ en ĉina strato?

Do se ĉiuj povas senti sin indiĝeno sur nia Planedo, tio signifas, ke ni ĉiuj estas gefratoj. Ĉu ni sentas tion?

En nia propra lando eble ni prenas respondecojn enirante en la politikan vivon por mastrumi la landon kiel oni mastrumas domon, eble ni aktivis por evoluigi la landon, por plifortigi la komercon, por nutri la kulturenan vivon, por protekti la ĉirkaŭaĵon. Ĉu ni faras la samon por la Planedo?

La Planedo TERO estas nia domo, nia loĝloko. Aŭskultu afrikan proverbon: *ni ne heredas la Teron de niaj prauloj, ni prunteprenas ĝin de niaj infanoj.* Nian domon ni purigas, ni mastrumas, ni prizorgas, ni protektas. Nian Planedon la Teron ni malpurigas, ni fuŝe prizorgas, ni malbone mastrumas, ni ne protektas. Ĝi estas elĉerpita kaj kolapsanta. Tajfunoj fariĝas pli fortaj, temperaturo altiĝas, glaĉeroj fandiĝas, plasto invadas la oceanojn, aero malboniĝas ne nur en la urbegoj, terenoj glitas kaj baras valojn, lagoj formiĝas kaj subite inundas la valon, kiam la baro cedas... Mortas homoj. Mortos homoj. Pri altiĝo de la temperaturo, jen konkreta ekzemplo: iksodoj estas fibestetoj, akaruloj, kiuj pikas homojn kaj bestojn kaj transdonas malsanojn; antaŭ dek jaroj ili troveblis en Svislando nur en la meza ebenaĵo, kie situas la grandaj urboj; tiu ebenaĵo kuŝas en alteco de 430–450 metroj super la marnivelo. Nun tiuj fibestoj vivas en mia montara regiono Ĵuraso, en alteco de 850 metroj kaj pli. Niaj ĵurasaj vintroj ne plu estas sufiĉe malvarmaj por forpuŝi la fibestojn. Alia ekzemplo: en la Alpoj la glaĉeroj, tiuj glaciaj lagoj, iom post iom malaperas. Ĝis 2100 restos 20% de glacio; do la Alpoj aspektos rokaj, grizaj, ne plu blankaj. La nivelo de la oceano altiĝas pro la fandiĝo de la glacio ĉe la polusoj; Italio jam nun perdas belajn strandojn, kaj ne nur Italio....

Ni revenu al la monda situacio: la riĉaj regionoj bezonas krudmaterialojn por fabriki siajn luksajn ilojn, pro tio oni forrabas trezorojn en la evolulandoj, kiuj estas riĉaj en subsurfacaj materialoj. Por fari tion, la nordulaj ŝtatestroj diskutas kun la sudulaj ŝtatestroj kaj kune decidas pri malaltaj prezoj kaj koruptaj metodoj. Ĉar en Afriko plu valoras la afrikaj hierarkioj, demokrataj elektoj similas al teatraĵo; en okcidento la situacio similas, ĉar la komercistoj influas la politikistojn: vidu la laboron de la lobiistoj, tiuj, kiuj praktikas koridoran agadon. Mono estas kreita, sumoj gigantaj aperas en komputiloj sen ligo kun io ajn reala. Vunda mondo....

Gandhi diris: la homoj en okcidento devus vivi pli simple, por ke la aliaj povu simple vivi. Ĉu ni en la Nordo pretas modifi nian vivstilon? Kompreneble estas en la Nordo riĉuloj kaj malriĉuloj, kaj same en la Sudo, tamen en malsamaj proporcioj. Mi nun alparolas la nordajn riĉulojn: Ĉu ni pretas modifi nian vivstilon? Rezigni pri dua veturilo? Pli uzi publikajn transportojn ol personajn veturilojn? Rezigni pri novaj vestaĵoj? Manĝi malpli da viando? Vivi en pli malvarmaj domoj? Malaltigi nian uzon de plasto? Rezigni pri feriaj flugoj? Ĉu ni en la Nordo estas pretaj modifi nian vivstilon por ebligi, ke la Planedo Tero akiru novajn arbarojn, pli purajn riverojn kaj lagojn, pli bonan aeron, pli da algoj en la oceanoj, pli sanajn grundojn por fari pli efikan agrikulturon kaj digesti la malbonajn gasojn? Por ebligi, ke restu multaj bestospecioj, ke ĉesu la uzo de naftaj produktoj, ke estu en la oceanoj pli da akvo ol da plasto?

Urĝas agi. La registaroj faras etajn paŝojn, kiuj en la nuna situacio estas malprudentaj. Ni metas novajn tapiŝojn sur Titanic... Agi malrapide en la nuna urĝa situacio estas malklera decido. Jen mi provas fari komparon: se vi stiras aŭton sur glitema strato... estas momento, kiam vi ne plu sukcesas savi la situacion... Ni konsciiĝu, ke **la nuna ekonomia sistemo ne estas opcio.** Kapitalismo signifas kresko,



kaj ni nun observas, ke tio estas senelira vojo. Ni norduloj timas la enmigrantojn, kiuj fuĝas por trovi regionon por vivi, ĉar en sia propra lando ne eblas vivi, ne eblas vivteni sin kaj sian familion. Eŭropo maljuniĝas kaj ne multe naskas, Eŭropo estas la maljuna kontinento. Duono de la homaro troviĝas en Azio. Preskaŭ 40% de la tutmonda loĝantaro vivas en Barato kaj Ĉinio. La pezo de la ŝtatoj evoluas laŭ komplete nova maniero kaj ekvilibro. Ĉinio aperas kiel forta potenco, sekvas Afriko kun forte kreskanta ekonomio. Afriko la juna kontinento, kun universitatoj, kie studas cent mil studentoj en

unu urbo, ekzemple en Abomey-Calavi en Benino aŭ Dakaro en Senegalo. La plej granda franclingva urbo en la mondo estas Kinshasa kaj ĝi havas mondscale la rangon 42. Tamen Eŭropo volas doni lecionojn al Afriko kaj al la tuta mondo, ankaŭ Usono. Eŭropo kaj la tuta okcidento ankoraŭ ne konsciiĝas pri la reala situacio. Ĉu ni estas mense sanaj?

De kie venu la ŝanĝo? Ĉu ni fidu niajn politikistojn, aŭ ĉu ni agu mem, desube? Laŭ mi unue ni devas persone ekagi. „*Estu la ŝanĝo, kiun vi deziras vidi en la mondo*”, denove Gandhi.

Mi ne tre fidas la politikistojn, speciale tiujn, kiuj agas por faciligi kaj rapidigi sian karieron kaj faras malplenajn promesojn antaŭ la elektadoj. Pozitivaj kaj honestaj politikistoj foje aperas, sed ofte iuj malamikoj mortigas ilin; ekzemple Thomas Sankara en Burkina Faso. Ni la civitanoj devas, kie eblas, unue premi la registarojn kaj denove iri surstraten kiel en 2019 por premi kaj premi... Due: Ni povas partopreni en la politiko kaj provi influ ĝin pozitive. Kelkaj diras: kial ni purigu nian akvon antaŭ ol ĵeti ĝin en la riveregon, se la najbaroj antaŭ ni jam malpurigas la riveregon? Se homoj pensas tiel, la mondo neniam ŝanĝiĝos kaj kolapsos rapide. La homara vivo sur la Tero similas al tri sekundoj, se la tera vivo estus 24 horoj. Laŭ tio ni komprenas, ke ni damaĝas grundojn kaj terenojn, kiuj bezonis jarmilojn por ekaperi kaj esti produktivaj. Kaj ni damaĝas akvon kaj aeron per nia enorma industrio, kiu produktas multe pli ol tion, kion ni bezonas, kaj produktas nur por riĉaj landoj.

2 620 000 hektaroj da arbaroj malaperis en tiu ĉi jaro ĝis la fino de junio.

3 530 000 hektaroj da kultiveblaj terenoj malaperis en tiu ĉi jaro pro erozio.

6 000 000 hektaroj da novaj dezertoj aperis en tiu ĉi jaro, dum la unuaj ses monatoj.

Preskaŭ miliardo da homoj devas trinki nesalubran akvon.

2 miliardoj 400 milionoj da homoj vivas sen deca necesejo kaj iras al arbaro por urini kaj feki. En Barato, se virino devas iri dumnokte urini en la najbara arbaro, aŭ viro atakas ŝin kaj sekse perfortas ŝin, aŭ tigro atakas ŝin kaj manĝas ŝin. En Afriko, se mankas necesejo en lernejo, knabinoj restas hejme; konsekvence, por instrui knabinojn, oni unue konstruu necesejojn en la lernejoj.

La ĉasado kaj komerco de protektitaj bestoj donas ĉiun jaron profiton de 200 miliardoj da dolaroj al internacia svarmo da banditoj. La kontraŭleĝa forrabo

de manisoj el Afriko al Ĉinio povas esti la origino de la nuna kronviroza pandemio.

Ni devas esti konvinkitaj, ke **se ni ŝanĝiĝas, se ni modifas nian vivstilon, jam la mondo estas alia**. Ĉu vi konas la sintenon de la birdeto nomata kolibro? Kiam brulis la arbaro, la birdeto flugis al la rivero, prenis akvon en sia beko kaj iris porti la akvon sur la incendion. La aliaj primokis ĝin, sed ĝi asertis: mi faras mian devon laŭ miaj ebloj... Jen bona leciono por ni. Ni devas prizorgi nian Teron laŭ niaj ebloj, en nia loĝloko. Pensi mondscale, agi loke.

En decembro 1999, la okazanta kunveno de Monda Komerco Organizaĵo pri (M.O.K.) fiaskis pro kontraŭeco inter la „nordaj” kaj „sudaj” landoj kaj pro amasaj manifestacioj. En tiu okazo kelkaj alternativaj ĵurnalistoj fondis la tutteran movadon Indymedia; ankaŭ kelkaj aktivuloj, kiel ekzemplo la franca José Bové, iĝis monde konataj. Oni ĝenerale taksas, ke tiuj eventoj (je la „mateniĝo” de la 21-a jarcento) markis la komencon de tutmonda ondo da manifestacioj, movadoj, luktoj kontraŭ la ĝis nun regantaj tendencoj ĉe kapitalismo kaj registaroj, kaj de alternativaj pensmanieroj, nun konataj sub la nomo Alimondismo. Tial tiu nomo iĝis de tiam ia simbolo. Alimondismo estas nova politika movado, kies precipa celo estas konstrui „alian mondon”, ne laŭ la modelo de la tutmondaj kapitalismaj firmaoj. Alimondismo maturiĝas en la mondaj kaj kontinentaj sociaj forumoj (eŭropa, afrika, sudamerika kaj azia).

Memorendas la indiano el Seatlo (Seattle), Usono, najbara regiono de Kanado, kiu asertis: *"Kio trafas la Teron, trafas ankaŭ la gefilojn de la Tero. Kiam la homoj kraĉas sur la Teron, ili kraĉas sur sin mem. Ĉar tion ni scias – la Tero ne apartenas al la homoj, la homo apartenas al la Tero."* Oni intertempe klare kaj bone scias, ke tio ne estas romantikaĵo, sed amara science pruvebla vero...

La Monda Socia Forumo unuafoje okazis en la jaro 2001 en Porto-Alegro, en la ŝtato Suda Rio-Grando, en Brazilo. Poste ĝi okazis proksimume ĉiun duan jaron. En 2011 ĝi okazis en Dakaro, Senegalio. Tie mi mem ĉeestis. Mi deĵoris tie.

Tamen mi poste plurfoje uzis aviadilojn por iri al kongresoj, por restadi ie kaj tie, ĝis mi sentis bezonon bremsi tiun vojaĝemon. En 2019 mi planis trankvilan jaron 2020 en mia ĵurasa vilaĝo. Kaj tio okazis, okazas. Do la pandemio ne intervenis en mian vivoskemon. Same mi pripensas pri diversaj modifetoj de mia vivstilo por ne damaĝi nian Planedon.

Ni ĉiuj povas fari diversajn paŝetojn al tiu celo, individue, persone, facile. Etaj personaj paŝetoj adiciigās kune kaj la rezulto povas havi fortan influon. Ekzemple rezigni pri aĉetado post konstato, ke la ŝrankoj jam plenas. Aĉeti laŭ siaj bezonoj kaj ne laŭ siaj emoj, envioj, emocioj. Ekzemple recikligi legitajn gazetojn kaj uzitajn ladskatolojn. Ekzemple ripari difektitan ilon anstataŭ aĉeti novan kaj forĵeti funkciuntan ilon. Ekzemple kompoŝtigi ŝelojn de legomoj kaj fruktoj. Kaj pripensi antaŭ ol rapide agi. Ekzistas du agmanieroj, kiuj ambaŭ unuope povus solvi la CO₂-problemojn, se oni uzus ilin grandskale: sunenergio kaj agrikulturo, kiu protektas la grundon. Ne ĉiuj unuopaj homoj povas fari tion. Necesas komuna agado.

Alia simpla agado estas celi nulan produktadon de rubaĵo. Tio estas ekzemple aĉeti ĝuste tiun bezonatan produktaĵon, kies pakaĵo estas recikligebla. Se vi iras ĉe buĉiston por aĉeti viandon, vi povas kunporti skatolon kaj doni la skatolon al la vendisto, por ke li aŭ ŝi metu la viandon enen. Unu plasta folio malpli en la rubujon. Se vi iras aĉeti pomojn, vi povas kunporti saketon, kaj plurfoje uzi ĝin por tiaj aĉetoj. Se vi devas aĉeti panon, vi povas kunporti kotonan sakon kaj metu la panon en ĝin; tiel la panbakisto uzos malpli da paperaj saketoj. Se vi devas printi tekston, por laŭtlegi ĝin, kiel mi faras nun, vi povas uzi paperon, kies unu flanko jam estas uzita. Alia direkto tia-celen: Ni povas pli bone, pli ŝpareme mastrumi niajn manĝaĵojn. En Afriko mi eksciis, ke ankaŭ tie oni forĵetas manĝaĵojn, ĉar pro la varmeco kaj manko de fridujoj, pluraj manĝaĵoj rapide komencas putriĝi. Pro tio oni klopodas finmanĝi ĉion, kiam estas io por manĝi, kaj tial la infanoj suferas je malbona nutrado: foje tro, foje nenio. Do denove, ni provu kuiri por niaj bezonoj kaj, se eblas, ni finmanĝu vespere aŭ postatage tion, kion ni ne finmanĝis tagmeze.

De ĉiudirekta aĉetanto fariĝi aganto saĝa. Do jen vi aŭdis la gravajn nociojn de sobra vivo: rezigni, rekuperi, recikligi, ripari, kompoŝtigi kaj ... pripensi.

Sobra vivo ne estas trista vivo kaj resignado pri ĉio; sobra vivo ja kontentigas viajn bezonojn, kaj sciante, ke vi kontribuas al la sano de la Tero kaj al la bonfarto de aliaj homoj, vi vivas serene kaj feliĉe.

Kaj nun, pri ni **esperantistoj**, membroj de la tutmonda homa familio!

Kien ni situigas nin en tiu homaro, kie riĉuloj najbaras kun malriĉuloj, kie ŝtatestroj pensas pli pri regiona politika ekvilibro ol pri sano kaj bonfartado de sia popolo (tion diris al mi junuloj en Irano pasintjare), kie Unuiĝintaj Nacioj, kiuj festas nun sian 75-jaran agadon, ne sukcesas starigi pacon en la mondon, laŭ sia unua celo. Kompreneble ni esperantistoj estas eteta

komunumo, diasporo loĝanta tra la tuta mondo. Ni agu en nia loĝloko, ni provu esti pozitiva ekzemplo en nia eta loka komunumo, vilaĝo, kvartalo. Kaj ni ade komuniku inter ni por interŝanĝi informojn, metodojn, rimedojn, por bonigi la mondon. Ni devas substreki la abundajn reciprokajn helpojn, kiuj ekzistas en nia Movado inter la norduloj kaj la suduloj. Temas ne nur pri sendado de lernolibroj pri Esperanto, temas pri konstruado de putoj en Tanzanio, subteno al familio en Nepalo, lertigado de virinoj en gvidaj roloj en Benino, kaj multaj aliaj agadoj, pri kiuj mi scias nenion kaj ne povas raporti....

Kaj ni **instruistoj**, kio estas nia rolo?

Ĉiuj nuntempaj saĝuloj – tamen estas kelkaj – ade asertas, ke la pozitiva evoluo kuŝas en EDUKADO. Nelson Mandela diris: „**La plej potenca armilo por plibonigi la mondon estas edukado**”. (Vidu la kovrilpaĝon de IPR en januaro 2015). Julius Nyerere en Tanzanio metis en la instruprogramojn efikan kaj protektan teknikon por agrikulturo; la infanoj poste instruis tion al la gepatroj. Gutierrez, ĝenerala sekretario de UN, same insistas pri taŭga edukado. La fakuloj pri la klimato diras la samon. Infanoj devas aŭdi pri la funkciado de la Tero, pri la neceso respekti ĝin, pri la maniero protekti ĝin, pri la homaj rajtoj, pri la kerna vorto **RESPEKTO**. Same kiel ĉio en biologio fontas el fiziko kaj kemio, ĉio en justeco kaj paco fontas el respekto. Tiun valoron ni devas havi en ni, uzi en nia ĉiutaga vivo kaj ni devas transdoni ĝin al ĉiuj, kiujn ni instruas.

Dankon pro via atento!

Plurlingva edukado en Barato: taskoj kaj defioj

A. Giridhar RAO (rao.giridhar@apu.edu.in, <http://lingvovivo.blogspot.com>)



Kun pozivitaĵo ni komencu tiun ĉi superrigardon de unu parto de la barata lerneja sistemo. La Nacia Edukstrategiaro 2020 (NES 2020), kiu aperis en julio 2020, forte rekomendas gepatralingvan edukadon:

„Kie eblas, la instrulingvo, almenaŭ ĝis la 5-a klaso, sed prefere ĝis la 8-a klaso kaj poste, estu la hejmlingvo / gepatralingvo / loka lingvo. Poste, kie eblas, la hejmlingvo / loka lingvo daŭre estu

instruata kiel lingvo. Oni faru tion ĉi kaj en publikaj kaj en privataj lernejoj.” (pĝ. 12)

Ni revenos al tiu ĉi rekomendo poste. Sed antaŭ ĉio jen listo de urĝaj farenadoj dum la pandemio:

1. Remalfermi lernejojn. Komprenble kun sansekureco de la infanoj kaj ĉiuj aliaj. Guberniaj registaroj kune kun neregistaraj organizaĵoj kiel la Fondaĵo Azim Premji (kun kiu mi laboras) jam finverkas la planojn.
2. La barata konstitucio garantias la Rajton je edukado (2009). Pro la fermitaj lernejoj la plej vundeblaj sekcioj de la lernantoj, nome la Dalitoj (t. e. la iamaj netuŝebluloj de la hindua kast-sistemo), kaj Indiĝenoj ne ĝuas tiun ĉi rajton. Ilia viva situacio simple ne permesas teknologiajn solvojn kiel interretan edukadon.
3. La lerneja manĝaĵo estas ofte la nura bona taga nutraĵo por la infanoj. Ili do suferas krom kogne ankaŭ fizike dum la pandemio.
4. Esti en lernejo signifas, ke oni ne laboras ie en kampo, minejo, vendejo aŭ ĉeĥejme. La nombro de infanlaboristoj kreskis dum la lernejo-fermo.
5. Aparte por knabinoj, esti en lernejo signifas, ke la familio ne provos „foredzinigi” ilin.
6. Sume, ju pli longe la lernejo restas fermita, des pli da lernantoj neniam revenos al la lernejo. Bonŝance, pluraj gubernioj jam planas remalfermi siajn lernejojn.

Post tiu listigo de urĝaj farenadoj, ni revenu al nia „pozitivaĵo” -- la rekomendo en NES 2020 pri gepatralingva edukado. Tuja malfacilaĵo estas, ke la termino „gepatralingvo” fakte kovras sufiĉe malsimplan lingvan variaĵon. La bhojpura lingvo, ekzemple, havas kapskuigajn 51 milionojn da denaskaj parolantoj. Tamen, en la klasifika sistemo de la registara popolnombro, oni metas ĝin sub la rubriko, „la hindia”. Estus do misgvide pretendi, ke la infanoj de tiu lingvo-grupo ricevas gepatralingvan edukadon.

En la rekomendo de NES 2020, kruca parto de la teksto estas la jena: „Oni faru tion ĉi kaj en publikaj [t. e. registaraj, senpagaj] lernejoj, kaj en privataj [pagendaj, profitcelaj] lernejoj.” Jen dua malfacilaĵo.

La privata lernejo-industrio certe malkonsentos kun tiu rekomendo pri la gepatralingvo kiel instrulingvo. Ilia tuta profitmodelo dependas de la promeso de la angla: ju pli da angla, des pli bone; ju pli frue en la angla, des pli bone.

Tamen, la dokumento, NES 2020, mem donas plurajn „eskap-vojojn”. En la citita rekomendo, oni du fojojn legas „kie eblas”. La vortumado de la rekomendoj simple ne estas sufiĉe forta. Tiuj, kiuj devas plenumi la rekomendojn, sed ne volas tion fari, trovos sufiĉe da kialoj eviti tion. Anstataŭ prezenti la rekomendojn kiel partojn de lingvaj homaj rajtoj, la teksto lasas ilin kiel „dezirindaĵojn”.

Lastatempe en pluraj gubernioj en Barato malfermiĝis plua batalfronto kontraŭ la rekomendo en NES 2020. Jen registaraj lernejoj kiuj transiras de la loka gubernia lingvo al la angla kiel instrulingvo! En mia loĝ-gubernio, Karnatako, 1000 lernejoj estis elektitaj; en la najbara gubernio Telangano, preskaŭ 2000 instruistoj de la elementaj jaroj estis elektitaj. Ambaŭ grupoj ricevas trejnadon por kapabliĝi instrui en la angla. La edukinstancoj en ambaŭ gubernioj faris tion por renversi la „elfluo”n de lernantoj el la (loka-lingvaj) registaraj lernejoj al la (anglalingvaj) privataj lernejoj.

Ĉu la projekto eduke sukcesis? Estas tro frue deklari ion difinitan. Sed estas pluraj raportoj de malriĉaj familioj, kiuj eksendas siajn gefilojn al registaraj lernejoj, nun kiam la lernejoj iĝis anglalingvaj. (Des pli dum la pandemio, kiam multegaj perdis sian laboron kaj do ne plu kapablos pagi al privataj lernejoj.) Tiurilate, do ja sukcesis la projekto.

Tamen nun estas ia nekohereco, ĉu ne, inter la rekomendo en NES 2020 kaj la guberniaj lingvopolitikoj! Jen tria malfacilaĵo kun la dokumento. Kiel ŝtopi la breĉon? Unu solvo ŝajne kuŝas en NES 2020 mem. Temas pri dulingva edukado. La dokumento plurloke aprobas dulingvan edukadon. Jen ekzemplo: „Studentoj kies instrulingvo estas la loka lingvo, eklernos la sciencon kaj matematikon dulingve en la 6-a klaso tiel ke ĝis la fino de la 9-a klaso, ili povos paroli pri la scienco kaj aliaj studobjektoj kaj en la hejma lingvo kaj en la angla.” (pĝ. 12-13)

Oni do povos vidi la kapabligon de instruistoj kiel preparlaboron por dulingva edukado. Kompreneble necesos prepari materialon por dulingva edukado. Efektive, NES 2020 proponas la starigon de Barata Instituto de Tradukado kaj Interpretado (IITI) por prepari „alt-kvalitajn dulingvajn lernolibrojn kaj lernomaterialojn”. La disponigo de tia materialo eble allogos ankaŭ la privatajn lernejojn kaj aliajn profit-celajn instancojn en la eduksektoro.

Oni devas prepari tiajn materialojn „desube” (por la lernantoj), kaj „desupre” (por la instruistoj) – kaj organizi trejnad-kursojn tiucelajn. Jam de

jardekoj, registaroj kaj neregistaraj organizaĵoj sporade preparis dulingvajn lernomaterialojn, ofte por indiĝenaj infanoj – tio estas, lernolibrojn en regiona lingvo kaj en indiĝena lingvo. La ĉefa kialo, ke tiuj projektoj ne estis daŭripovaj, estas la manko de konstanta ŝtat-subtenado. La projektoj dependis kruce je unuopaj aktivuloj kaj bonkoraj burokratoj. Eble nun kun la starigo de la IITI, oni ŝtopos tiun breĉon.

Gravos do la rolo ankaŭ de la supera eduksistemo en la preparado de tia „desupra” materialo. Tiurilate, ni menciis du jamajn iniciatojn. La unua iniciato pri dulingva edukado troviĝas en Universitato Azim Premji (kie mi instruas), Bengaluro. Ĝia celo estas disponigi la legaĵojn de ĉiuj kursoj (almenaŭ komence) en la hindia kaj kanara lingvoj. La universitato celas instrui multlingve, por ke supera edukado estu alirebla por multe pli granda grupo ol nur por tiuj, kiuj scipovas la anglan.

La dua iniciato estas la Nacia traduk-misio (NTM). Tiu projekto troviĝas en la Centra Instituto de Barataj Lingvoj en Majsuro. NTM jam preparis liston de universitat-nivelaj „scio-tekstoj” en 69 fakoj – de la astronomio ĝis la zoologio. Ĉiuj el tiuj anglalingvaj lernolibroj estas jam uzataj en universitatoj tra la lando. Reto da tradukistoj celas disponigi tiun amason da libroj en ĉiujn oficialajn lingvojn de Barato. Jam 63 tradukaĵoj estas eldonitaj kaj akireblaj. Ili inkluzivas help-materialojn kiel dulingvaj fakvortaroj kaj manlibroj pri tradukado.

Espereble, do, tiuj desubaj iniciatoj (de la lerneja nivelo), kaj despuraj iniciatoj (de la universitata nivelo) kune kreos efikan sistemon de plurlingva edukado.

Fine, ni turnu nin al pli granda demandaro, nome, ke la lando funkcias kiel federa demokratio. Necesas en tia ĉi politika strukturo la konsento, kunlaboremo kaj kunordigo de pluraj instancoj -- kaj registaraj kaj civilsociaj. Krome, la eduksektoro estas listigita en la konstitucio de Barato kiel parto de la t. n. „komuna listo”. Kaj la centra registaro kaj la unuopaj gubernioj rajtas fari leĝojn por realigi eduk-projektojn. Des pli grave, do, ke ekzistu dialogemaj registaroj.

Krome restas pluraj aliaj defioj por la eduksistemo. Jen kelkaj el ili: kosto-divido; la burokrateco; la regiona/religia/lingva ŝovinismo. Tiuj kiuj laboras en la sektoro, ja scias, ke la vojo estas longa; kaj la tasko transgeneracia. Sed nur per tia kuna persistemo ni atingos tion, kion diris la urdua poeto Faiz Ahmad FAIZ [fejz]:

„*magar shaam hii to hai*” de Faiz "Nur nokto ĝi estas" de Faiz

*dil na-ummiid to nahii.n
naakaam hii to hai
lambii hai Gam kii ŝaam
magar ŝaam hii to hai.”*

Ne senesperas la koro
Nur nesukcesa ĝi estas
Longas la nokto de l’ tristo
Sed nur nokto ĝi estas.”

Ĉu dezirinda kvara povo?

de Mireille GROSJEAN (*Svislando*)

La 2-an de oktobro 2020 mortis Eugène de Zilah, hungardevena esperantisto, kiu vivis en Francio. Li lanĉis en 1985 revuon kun la nomo „La Gazeto”. En 2019 la revuo ĉesis aperi, kaj iom poste forpasis ĝia ĉefredaktoro kaj fondinto.

En tiu revuo mi provis legi la ĉefartikolojn, kiuj ĉiam estis de la plumo de Eugène de Zilah. Ili estis tre interesaj kaj pensigaj. Hodiaŭ mi volas dividi kun vi ideon lian, kiu aperis antaŭ pluraj jaroj, mi ne memoras ekzakte kiam. Kaj vi komprenos, kial mi venas hodiaŭ al tiu intenco paroli al vi pri tiu temo.

De Zilah memorigis pri la tri povoj, kiuj estas la bazo de demokratio: la leĝofara povo, kiu estas la Parlamento; la ekzekutiva povo, kie ekzekutiva signifas faranta, efikiganta; tio estas la Registaro, kiu konkretigas la decidojn de la leĝofara povo. Apude kaj sendepende ekzistu la Justico, la tribunaloj, kiuj punas tiujn, kiuj ne obeas al la leĝoj. En la nuna mondo la decidpovaj instancoj pri la enhavo de la instruado kuŝas en la manoj de la Parlamento kaj/aŭ de la Registaro.

Post tiu konstato Zilah iras plu kaj lanĉas la ideon, ke devus esti kvara povo el diversaj saĝuloj, intelektuloj, fakuloj, kiuj decidu pri la enhavo de la transdonotaj scioj kaj pri la uzendaj metodoj. Bonvolu imagi tion.

Laŭ mia scio tia situacio nenie ekzistas. Nek la instruistoj nek la gepatroj povas decidi, kiun fremdan lingvon la infanoj unue lernu. Pli tikla afero estas la enhavo de la manlibroj pri historio de la lando. Tie la aŭtoroj estas zorgeme elektitaj de la Registaro kaj la enhavoj strikte kontrolitaj. Kio estas la risko por instruisto, kiu forlasas la postulatan vojon kaj diras en sia klasoĉambro alian version de la historio? Certe la risko estas granda. Do neniuj demokratio ekzistas en tiaj instrusistemoj. Naskiĝis aliaj metodoj, kie konsultiĝo ekzistas

kun gepatroj, geinstruistoj kaj gestudentoj, ekzemple, en la pedagogio Freinet. Paralele al la ŝtataj lernejoj ekzistas tiaj institucioj. Tamen ilia nombro varias de lando al lando.

Nuntempe en la publikaj lernejoj fakte la instruistoj estas vektoroj de la Registaro kaj ricevas ordonojn, instruprogramojn, kiujn ili nur simple devas sekvi. Povas esti, ke la opinio de iu instruisto ne similas al tiu de la Registaro; kion fari? Silenti? Obei? Iri al alia profesio? Kiam mi instruis pri civitaneco, mi diris al miaj lernantoj (15-jaraj): Mi ne povus instrui en Francio, ĉar mi rifuzus instrui la himnon de Francio, kiu estas sangavida.... alvokas al mortigo.... Feliĉe nia svisa himno estas tute milda priskribo de belaj montoj....

En la lernejo, kadre de diversaj kursoj, estas prezento de la historio, de diversaj religiaj tendencoj, de diversaj politikaj pensmanieroj. Plureco de la tendencoj estas ankaŭ bazo de la demokratio, same kiel la tri povoj kaj ties sendependeco. Prezento, tio estas nek laŭdo nek rekomendo. La instruisto devas esti neŭtrala en tiu prezento. Tamen okazas, ke la voĉo, la mieno, la intonacio donas indikojn al la lernantoj, kiuj tiel povas flari la opinion de la instruisto. Estas tikla tasko fari neŭtrale tian prezenton. Kompreneble estas malpermesite diri: „Tiu partio estas stulta brutaro... tiu tendenco estas laŭdinda subteninda grupo...” Prezento nepras, por ke la lernantoj povu poste elekti sian starpunkton. Sen konoj ne eblas elektado.

Bonvolu aŭskulti eventon de la tempo de mia instruado: iun vendredon mi havis kunsidon, do anstataŭanto iris al mia klaso kaj faris la lecionon. Li devis fari teston. Mi petis, ke li sendu al mi la testojn tuj, tiel ke mi povu korekti ilin dum la semajnfino. Tiel okazis. Dum la korektado mi surpriziĝis: tiu lernanto faras tian eraron.... strange... li konas tiun vorton... kial li eraris... la leciono ne evoluis serene, io okazis... Lunde mi alvenis al la klasoĉambro kaj tuj kiam mi malŝlosis la pordon, la lernantoj ariĝis ĉirkaŭ mi kaj diris: via anstataŭanto vere estis stranga homo... li diris strangajn aferojn.... Do ni eniris, sidiĝis, kaj mi ekaŭskultis la raportojn de la diversaj lernantoj. La anstataŭanto devojiĝis al religia temo kaj klarigis, kiom gravas preĝi trifoje tage, legi Bibliion.... Iu lernantino diris: li demandis min, kiom ofte mi preĝas ĉiun tagon, mi ne emis respondi, tamen mi devis... Tiam mi klare diris: Ne, vi ne devis respondi, vi havis la rajton diri „NE, MI NE VOLAS RESPONDI AL TIU DEMANDO”. Vidante la seriozecon de la afero, mi iris serĉi la direktoron kaj petis la lernantojn denove raporti al li pri tiu stranga leciono. La knabino silentis. Do mi raportis pri ŝia diro: „Li demandis min, kiom ofte mi preĝas ĉiun tagon, mi ne emis respondi, tamen

mi devis...” La direktoro reagis ekzakte same kiel mi: en tia situacio vi havas la rajton diri NE. Li kaj mi ankaŭ klarigis al la lernantoj, 12-jaraĝaj: „Se iu prezentas al vi ian blankan substancon dirante prenu, manĝu, vi sentos vin tute bone per tio, kaj/aŭ vendu tion! Tutcerte vi diru NE”. Se iu proponas fiagon grupe farotan, tutcerte vi diru NE. Se iu nekonata plenkreskulo proponas, ke vi iru al lia ĉambro por spekti filmojn, tutcerte vi diru NE. Post tiu evento la anstataŭanto neniam plu aperis en la lernejo. Mi estis tre



bonŝanca instruante en Svislando pro la fakto, ke la klasoj havis 22 ĝis 25 lernantojn, do demandoj kaj respondoj eblas, debato ofte okazas, lernantoj povas esprimi sin. Plia defio por la instruisto, kiu devas stiri la ŝipon.

La abundo kaj libereco de la gazetaro estas bazo de demokratio kaj studobjekto en la lernejoj


En la socio estas multaj diversaj tendencoj. Ĉe la gepatroj, ĉe la lernantoj, ĉe la instruistoj. Kaj tiu situacio kaŭzis tragedion en Francio, kiu skuas ĉiujn instruistojn kaj ne nur ilin. Fakto estas, ke junulo aparte kruele mortigis instruiston, kiu prezentis la esprimliberecon, kiu regas en Francio, montrante la karikaturon de Mahometo, kiuj unue aperis en dana gazeto kaj poste en franca gazeto. Pro la ĵusaj evoluoj en la proceso lige kun la murdoj ĉe la gazeto *Charlie-Hebdo*, la tuta amaskomunikilaro lastatempe okupiĝis pri la temo, kaj tial la temo estis aktuala – pro kio estas aparte kompreninde, ke la instruisto Samuel Paty elektis ĝin por pridiskuto. Indas diri, ke la instruistoj havas apartan respondecon klerigi la gelernantojn pri aktualaĵoj, por ke ili havu helpon interpreti tion, kio okazas kaj estas vigle diskutata de la publiko. Tiu parto de tiu leciono estis la kaŭzo de tiu murdo. Antaŭ tiu evento estis diskutoj inter la instruisto, la direktoro de la lernejo, la gepatroj, abundaj diskutoj. Tamen la konflikto ne solviĝis, ne trovis pacan eliron. La murdisto ne konis la instruiston, li venis de alia parto de la lando por murdi. Notendas la rolo de la sociaj retoj, kie aŭdiĝas alvokoj al perforto, kiujn oni nur malfacile povas identigi kaj bremsi aŭ malpermesi. Ni vivas nun en „erao de abunda komunikado kaj de la ĉie aperantaj kaj ĉion anoncantaj ekscesemaj sociaj retoj”. La tuta lando omaĝis al tiu homo, kiu defendis la valorojn de la franca respubliko: libereco, egaleco, frateco kaj laikeco (rajto havi aŭ ne religion, kaj libere praktiki ĝin private).

Do nun: kiel ni trovos la „arton labori kune”, la arton vivi kune, harmonie? Tiaj miksitaj socioj, kiel estas en Francio, ekzistas tute same en plej diversaj landoj de la mondo. Homoj vojaĝas, migras, fuĝas, translokiĝas. En Francio estas ne nur francoj, en Svislando estas ne nur svisoj, en Togolando estas ne nur ĉefgrupaj togolandanoj.... Ni lernas en la lernejo la limojn, la mapojn, ili metas kadron en nian kapon. Tamen la realeco estas alia. Ni devas adapti nian vidon kaj akcepti la realecon, koni ĝin kaj labori kun ĝi. Ni devas trovi strategiojn por alproksimigi la enmigrantojn kun la lokanoj, cele al evito de ksenofobio. Devas esti la tasko de la ŝtato. Mi sekvas la strategiojn en mia kanton Neuchâtel, kiu nun fariĝis modelo por la tuta Svislando: festivaloj, premioj por engaĝitaj aktivuloj, kunvenoj, prelegoj kaj aliaj. Nepre oni evitu la naskiĝon de unugentaj kvartaloj, de getoj; nun oni diras „komunumoj”. Kaj ni konstatas, ke denove la instruistoj estas la perantoj de tiaj strategioj, ĉar tia kunvivado naskiĝas en la klasoĉambroj. Do nia respondeco estas giganta.

En mia instruado pri la germana venis ekzerco: „Franco trinkas ruĝan vinon. Germano trinkas bieron. Ruso trinkas vodkon. Japano trinkas sakeon...” Nun mi ne uzus tian ekzercon, mi kreus ion alian por la sama celo. Ne estas la tasko de la instruado firmigi la stereotipojn. Iu franco povas trinki tizanon kaj iu germano povas ĝui trinki ian vinon... Japanoj tre ŝatas bieron... Ia ĝeneraligo estas evitinda. Ne ĉiu eŭropano estas riĉulo... ne ĉiu afrikano estas malriĉulo... Oni ne rajtas meti ĉiujn anojn de iu gento en la saman sakon. Oni ne ĝeneraligu. Ankaŭ tion ni devas instrui. Do nia tasko estas giganta kaj malfacila.

SAVU LA PLANEDON KUN LA NOVA ESPERANTA STELULO: KUNGFUA KUNIKLETO

de Alessandra MADELLA (Italio)



Lastatempe en la Youtube-paĝo de ILEI aperis kanto pri la Puera Teo de Yunnan-o kaj detala priskribo de nova 3-dimensia animacia projekto por ekologia edukado, kun kiu ankaŭ ILEI estas esploranta kunlabore. La stelulo de tiu animacio estas la Kungfua Kunikleto, blua stelulo, kiu luktas por savi la planedon kun siaj geamikoj, uzante saĝajn vortojn eĉ pli ol batalartajn movojn. Ĝiaj malamikoj estas la dezertigado de la Tero,

la malapero de abeloj, la fandado de la glacimontoj, la polua rubforigo kaj ĝenerale ĉio, kio malebligas al infanoj pli aŭtentan sperton de la naturo. Sciencaj fakuloj helpis en la verkado por garantii la pedagogian valoron de la serio.


Kelkfoje estas revoj, kiuj restas en tirkesto dum multe da jaroj. Tio okazis al tiu ĉi animacio, kiu estas la ambicia revo, per kiu la hispana reĝisoro Miguel Herberg volas fini sian longan engaĝitan karieron, komenciĝintan en la sepdekaj jaroj per dokumenta filmo kontraŭ la diktaturo de Pinochet (elp. Pinoŝe). En la okdekaj jaroj, studante animacion en norda Ĉinio, li profete komprenis la kreskantan gravecon de ekologio kaj daŭripova evoluigo, kiuj povas esti helpataj nur fare de aparta edukado ekde la infanaĝo. Pro tio li kreis la ĉarman kunikleton kaj registris ĝian kopirajton jam en 2006. Sed dum multe da jaroj estis malfacile konvinki homojn pri la graveco de tiuj temoj kaj pordoj restis fermitaj. Malgraŭ tiuj malfacilaĵoj la Kungfua Kuniklo kaj ĝiaj geamikoj akiris formon, dank' al desegnoj de la hispana pentristino Marisol Caldito kaj al la kunlaboro de la produktanto Maximilian Garcia (*vd dekstre*) kaj de la ĉina fakulino Ningna. Ili ĉiuj portis sian moralan entuziasmon al la projekto, je kiu ili forte kredis kaj por kiu ili estis pretaj investi jarojn de sia vivo.



Tiel nia kuniklo povis fari siajn tute unuajn paŝetojn en sia batalo por savi la planedon en ĉina animacia studio, kie la unuaj minutoj en la angla estis kreitaj. En tiu formo ĝi aperis antaŭ la estroj de CCTV - la ĉina televido - kiel ilo por edukadi samtempe al ekologio kaj al la angla, ankaŭ dank' al dulingvaj libroj. Tamen la pordoj de CCTV estis nur parte malfermitaj. Kiel ties respondeculoj asertis, la animacio estas tre interesa kaj inda. Eĉ la ĉina registaro povus interesiĝi je ĝi, sed Ĉinio ne povas savi la mondon sola. Do, ili sugestis reveni, kiam oni povos montri, ke ankaŭ aliaj mondaj instancoj interesiĝas pri tiuj ĉi temoj. Tiam kun-produktado certe fariĝos ebla.

Sed kiel trovi tiun bezonatan mondan publikon? Maximiliano Garcia ekvidis ĝian eblon en februaro 2020, kiam li flugis el Hispanio al Parmo, Italio, por partopreni en la evento „Teo kaj Amo: Interkultura Dialogo”, kiu estis organizata fare de la Esperanto-grupo Giorgio Canuto de Parmo por “Parmo Itala Ĉefurbo de Kulturo 2020”. Universitataj profesoroj el kvar landoj de Azio kaj Eŭropo prelegis pri teo kaj animacioj, kun lumbildoj subtitolitaj en Esperanto al publiko de esperantistoj kaj simpatiantoj, kiel la Interreligia Forumo kaj la Germana Legad-grupo de Parmo. Vidante tiun kombinaĵon, Maximiliano Garcia komprenis, ke estis bonŝanca renkontiĝo,

kiu povus malfermi, horizonton de ebloj antaŭe ne konsideratan. Li tuj komprenis la simpatian de celoj inter Esperanto kaj la ekologiema kuniklito. Esperantistoj, kiuj estas en ĉiuj landoj, estas nature la internacia publiko, kiun li estis serĉanta. Ili povas doni valorajn respondojn kaj komentojn por plibonigi mesaĝon, kiu celas la tutan mondon. Ankaŭ esperantistoj jam delonge aktive engaĝiĝas pri temoj de naturmedia protektado, kunlaborante kun Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj internaciaj organizoj. Kaj precipe ili havas multe da sperto pri internacia pedagogio kaj pri la uzado de diversaj komunikaj rimedoj por instruado. Do ili povas doni al la animacio grandan videblon ene de kaj ekster Esperantujo.



La roluloj

Ankaŭ deflanke de Esperanto tiu ĉi estas potencie tre pozitiva renkontiĝo. Ĝis nun Esperantujo havas multe da spertoj pri la eldonado de libroj, sed ne multe pri pli multekostaj iniciatoj kiel 3-dimensiaj animacioj. En mondo, en kiu nuntempaj infanoj kaj geknaboj lernas el bildoj almenaŭ tiom multe kiom el skribitaj paĝoj, tiu pli kaj pli grava parto de edukado ankoraŭ ne havas sufiĉe da reprezentantoj en Esperantujo. Ne estas surprize, do, ke la prezentaj videoj pri la kuniklito en la Youtube-paĝo de la Itala Esperanto-Federacio multe altigis la nombron de la registritaj anoj kaj havis la plej multajn vidojn, samtempe plialtigante ankaŭ la vidojn de la najbaraj

videoj. Tiel multe oni sentas la mankon de tia iniciato por tuŝi la pli junan publikon. Krome, animacio, kiu estas malfermata al Esperanto, povas alparoli ankaŭ ne-Esperantan publikon per novaj vortoj, eble ne tiel direktaj, sed certe pli freŝaj. Ekzemple, estas plano serĉi la moralan subtenon de ekologiema Nobel-premiito pri kemio, kiu povus interesiĝi al tiu maniero uzi Esperanton por engaĝiga temo.

Pluraj Esperantaj institucioj tuj komprenis la potencialan valoron de la afero kaj pretis kunlabori. Favoraj komentoj venis el samideanoj de diversaj landoj, de Kanado ĝis Japanio. Kun la helpo de Itala Esperanto-Federacio, enkonduka video estis muntita en Romo. La Esperanta sekcio de *Ĉina Radio Internacia* raportis pri la bazaj ideoj de la animacio, sekvata fare de *El Popola Ĉinio* kaj de *La Ondo de Esperanto*. TEJO diskonigis la prezentajn videojn en siaj kanaloj. La Asocio de la Te-amantoj prezentis al Maximiliano Garcia ĉinan teo-entrepreniston, kiu tiel multe ŝatas la kantojn en Esperanto pri teo-plantado kontraŭ dezertiĝado, ke li eĉ pensas uzi ilin por prezenti siajn produktojn al la ĝenerala publiko en Ĉinio. Humphrey Tonkin parolis pri la kunikleto en sia tri-lingva informilo por Unuiĝintaj Nacioj kaj nun estas planoj verki franc-lingvan pli longan prezenton de ĝi por UNESKO pro la graveco, kiun temoj kiel daŭripova evoluigo havas nun por tiuj internaciaj instancoj. Martin Schaeffer proponis formi UEA-komisionon por helpi la kunikleton. Kaj nun ankaŭ ILEI, pere de la persona engaĝiĝo de Mirejo, havas tre interesajn proponojn, kiel ekzemple la eldono de ekologiaj libretoj por ĉiu ĉapitro de la animacia serio en Esperanto kaj en la angla, kun la celo stimuli tradukadon en ĉiujn lingvojn.

Tiu atento fare de Esperantaj instancoj portis grandan esperon al la kreintoj de la kunikleto, kiuj estas ĉiuj jam poliglotoj kaj kutime verkas siajn originalajn filmojn en miksaĵo de lingvoj. Maximiliano Garcia estas nun lernanta la duan lecionon de la kurso KIREK de Itala Federacio, kie li havas kiel privatan instruiston poliglota amatoran filmiston. La reĝisoro Miguel Herberg finverkis la unuan version de epizodo pri Esperanto en la itala, en kiu bela gazelo kaj saĝa heliko parolas en la internacia lingvo dum ĉiuj aliaj bestetoj pensas, ke tio estas tre mojosa afero. La tuta ambicia programo de la Kungfua Kunikleto inkluzivas epizodojn de 30 minutoj pri diversaj problemoj de medi-protektado, akompanataj de du-lingvaj libretoj, DVD, apoj kaj aliaj rimedoj por amuza edukado. La fina fazo de la programo aparte celas ankaŭ edukadon al medi-protektado en Afriko kaj la instruadon de Esperanto kiel lingvo de la paco al afrikaj infanoj.

Problemo kun la Multlingva Akcelilo (MLA): parte kritikinda enhavo

Kunlaborintaj landoj: Slovenio, Slovakio, Kroatio, Bulgario, Germanio, Danlando. El tiuj landoj kunlaboris diversaj institucioj aŭ universitatoj. Temas pri giganta laboro, kiu daŭris tri jarojn kaj ricevis financan subtenon de Eŭropa Unio. La kurso nun ekzistas en diversaj lingvoj: bulgara, Esperanto, germana, kroata, slovaka kaj slovena. (Mi ne sukcesis akiri sciojn pri la aŭtoroj. Mi scias, ke la motoro de la projekto MLA estis Zlatko Tišljar kaj lia filino Maia. Kun ŝi mi nun estas en rilato.)

Kompreneble oni devas unue agnoski la grandegan laboron faritan kaj gratuli ĉiujn, kiuj kontribuis al tiu bela kaj valora projekto. Maia insistas pri la uzo de la baza morfemlisto ligita al la zagreba metodo. Mi tute konsentas. Mi esploris ĝin. Tie aperas di-, sankt- kaj milit-, sed ne aŭt-, aviad-, trajn-, kaj ankaŭ ne frukt-, legom-. Mi miras. Ŝajnas, ke iu statistika esploro pri ofteco devus esti denove farata baldaŭ.

La kurso konsistas el 6 lecionoj. La lecionoj enhavas meznombro 50 paĝojn. La celpubliko estas 8-jaraj infanoj. La kurso estas por instruistoj, kun indikoj pri metodologio. La instruistoj ne nepre parolas Esperanton, kiam ili ekuzas la kurson.

Tri francoj, kiuj laboris por enkonduki Esperanto-ekzamenon ĉe la bakalaŭro, diskonigis tiun kurson MLA, tio estas ĝian franclingvan version, al 55000 lernejoj en Francio. Tiel la kurso atingis Jean-Claude Roy, kiu informis min pri ŝoka enhavo la 25-an de septembro. Li listigis por mi la tiklajn partojn, mi ricevis plenajn paĝojn. Mi povis konvinkiĝi, ke temo hommanĝantoj kaj belulino en garaĝo por vendigi aŭtojn, tio estas stereotipoj kaj maltaŭgaj temoj. Mi petis ĉesigon de la diskonigo kaj komencis profunde esplori. Mi tre dankas al Jean-Claude Roy pro lia subteno.

Kio estas akceptebla, kio ne estas akceptebla? Jen la problemo. Tia sento malsamas de kulturo al kulturo kaj de generacio al generacio. Ni ĉiuj konsentas pri tio. Kiam mi legas: la infanoj ĉiumaniere aŭdas tiajn frazojn pri belaj virinoj daŭre en sia ĉiutaga vivo, tion mi ne povas akcepti. Se iu viro ie parolas pri belaj virinoj, estas nur lia opinio. La enhavo de lernolibro, de kurso, estas io tute alia; lernolibro ne devas substreki kaj fortigi stereotipojn, kiujn la socio per multaj rimedoj volas forviŝi. Temas pri la respondeco de lernilaŭtoroj. Genra egaleco apartenas al la UNESKO-celoj de la jarmilo. Ni volas, ke UNESKO konu Esperanton, respektu Esperanton.

Por atingi tion, ni devas agi laŭ la principoj kaj celoj de UNESKO. Se tia kurso atingus UNESKON, Esperanto irus sub la tablon, ekster ia konsidero, por la cent venontaj jaroj... Tio estus katastrofo. Do dudeko da paĝoj en tiu kurso estas modifendaj. Jean-Claude Roy kaj mi starigis du listojn. Unu dokumento listigas la forigendajn stereotipojn. Alia dokumento listigas la malglataĵojn de la franclingva versio. Komprenible la unua dokumento kun la stereotipoj devas atingi la aŭtorojn de la aliaj versioj en aliaj lingvoj. La dokumentoj de Roy-Grosjean entenas ankaŭ solvojn, taŭgajn esprimojn uzindajn, do parto de la korekta laboro estas farita.

Alia aspekto estas apero en la kurso de subkomprenendaj aferoj, ŝercaj diroj. La demando estas, ĉu okjaruloj kapablas distingi inter serioza diro kaj ŝerca aludo. Oni diras al mi, ke ili devas al kutimiĝi al tio, ĉar tiaj aludoj kaj ŝercoj abundas en ilia vivo. Laŭ mi vorto en lernilo devas aperi kun sia baza, kerna, ĉefa signifo. Komprenible infanoj devas lerni misfidi la sociajn retojn, eĉ la gazetojn, kiuj foje diskonigas falsajn aferojn. Sed ĉu infanoj devas ankaŭ esti trejnataj pri misfido al lerniloj? Laŭ mi ne. Eĉ en ĉeesta kunesto kun la instruisto okazas, ke lernanto ne komprenas la ŝercon. Mi spertis tion en mia lernejo en Le Locle, kie 11-jara infano ricevis multajn librojn por ĉiuj lernobjektoj en la unua tago de la instruaro kaj demandis la instruiston: Ĉu vere mi devas kunporti tiun pezan dorsosakon ĉiun tagon en la lernejon? La ŝercema instruisto respondis jese. Post du monatoj iu alia instruisto konstatis, ke la knabo vere venis ĉiun matenon kun ĉiuj siaj lernolibroj en sia dorsosako. Kelkaj diros, ke li estis aparte stulta knabo. Mi ne konas lin, mi ne povas juĝi. Mi scias, ke ŝerci estas amuza sperto, sed kun danĝeroj; en ĉeesta kunveno oni povas aserti, ke la temperaturo estas iom freŝa, kiam ekstere estas minus 30 gradoj, kaj fini la diron per rideto aŭ mieno, kiu montras la distancon inter la diro kaj la vero. Tio ne povas okazi en uzo de lernolibro.

Se vi volas pli profunde malkovri la situacion, vi povas peti de mi

- la morfemliston kun rimarkoj
- la dokumenton pri stereotipoj
- la dokumenton pri la malglataĵoj de la franclingva versio.

Mi tre esperas, ke la aŭtoroj retrovos kuraĝon por glatigi tiun kurson, kiu estas tre valora kaj efike konstruita, kaj ĝi meritas vastan diskonigon. Post plibonigo de tiu kurso ILEI pretas vaste kaj forte diskonigi ĝian ekziston.

Mireille GROSJEAN
Prezidanto de ILEI

***Nota de la Redaktoro:** la sekvaj tri materialoj fontas el la Tago de Esperanto kaj Interlingvistiko en Universitatoj, kiu okazis la 28-an de julio 2020 kadre de la Virtuala Esperanto-Konferenco de ILEI, VEKI.*

ILEI-ESF-UEA-Laborgrupo pri Esperanto kaj Universitato

de Renato CORSETTI, Vicente MANZANO-ARRONDO (Viko), Byelongo Elisée ISHELOKE, Ivan Eidt COLLING, Katalin KOVÁTS, Martin PTASIŃSKI

Resumo. La ILEI-ESF-UEA-Laborgrupo estis starigita per la kunlaborado de la organizaĵoj ILEI kaj ESF danke al la unua alvoko fare de Angela Tellier kadre de ŝia enposteniĝo kiel kunordiganto de universitataj aferoj por ESF post la Simpozio Nitobe okazinta en Lisbono en 2018. Ĉi tiu teksto montras kelkajn elementojn, kiuj estas traktataj en la menciita grupo, kaj prezentitaj dum la Tago de Esperanto kaj Interlingvistiko en Universitatoj, kiu okazis en la 28-a de Julio 2020, kadre de VEKI, Virtuala Esperanto-Konferenco de ILEI. Unue oni prezentas la grupon kaj konkludas, ke se oni ne sukcese realigas kursojn pri Esperanto kaj interlingvistiko en universitatoj, ĉiuj aliaj agadoj estas pli malgravaj. Vicente Manzano-Arrondo kaj la aliaj listigas taskojn en la sukcesigo de Esperanto en universitato. Elisée prezentas la Universitaton de la Espero en DRKongo, ligitan al sia propra sperto en pluraj afrikaj landoj. Ivan priskribas tion, kion li spertis kiel esperantisto, kiu iĝas lingvisto kaj esperantologo. Kaj Martin, per la intervjuo fare de Katalin, priskribas ekzemplon pri tio, kiel atingi sukceson organizante kurson pri Esperanto kaj atingante lernantojn.

Ŝlosilvortoj: ILEI, ESF, sukcesigo de Esperanto en universitato, Esperantaj spertoj en universitatoj, instruado de interlingvistiko.

La tuta historio de internaciaj lingvoj kaj de Esperanto estas tre kunligita kun universitatoj. La esploroj faritaj en ĉi tiu kampo de la tempo de Komenio ĝis - en la pasinta jarcento - tiu de Jespersen, estis ĉiam kunligitaj kun laboroj farataj en la tiamaj universitatoj. Inter la du mondmilitoj, post la disvastiĝo de Esperanto en la komenco de la pasinta jarcento, estis multaj tiel nomataj „lektoratoj”, alivorte kursoj pri Esperanto, kiuj instruis centojn da studentoj. Ni devas memori almenaŭ pri la universitatoj en Ĝenevo, en Liverpulo, kie oni starigis la fonduson Buchanan, kiu ankoraŭ nun subvencias agadojn por Esperanto, en Zagrebo, kie ankaŭ ĉeestis pionira studenta universitata klubo.

Post la dua mondmilito, danke al la fondiĝo de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), denove ekestis impulso por instruado de Esperanto en lernejoj kaj en universitatoj. En ĉi tiu periodo tre rimarkinda estas la atingo de profesoro István Szerdahelyi en Budapeŝto, kie estis kursoj pri Esperanto, interlingvistiko kaj Esperantokulturo, kiuj kreis generaciojn da esperantistoj tre gravaj en la movado en la postaj jardekoj. El tiu universitato, post la morto de profesoro Szerdahelyi, venis ekzemple profesorino Ilona Koutny, kiu nun gvidas la kursojn pri interlingvistiko kaj Esperanto en la Universitato Adam Mickiewicz de Poznano en Pollando. Kaj ankaŭ en Nederlando oni starigis katedron pri interlingvistiko per la streboj de la nederlandaj esperantistoj. Per tio ni venis jam al la nuno. En la nuna tempo aliaj rolantoj en ĉi tiu kampo estas kaj la *Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)* de UEA, kiu estis fondita en la jaro 1952, kaj la usona institucio *Esperantic Studies Foundation (ESF)*, fondita en 1968. Kunmetante ĉiujn ĉi tiujn agantojn, post kunveno en la Universala Kongreso en Lisbono, organizita de *ESF*, formiĝis grupeto, kiu konsistis el la universitata komisiono de ILEI kaj la zorganto pri la organizado de ĉi tiu laborkampo en *ESF*, Angela Tellier, kaj aliaj respondeculoj el UEA kaj TEJO. Kunlaboras ankaŭ www.edukado.net, la retejo, subtenata finance de *ESF*, kiu estas la ĉefa renkontiĝejo de Esperanto-instruistoj, kun 5950 membroj en 137 landoj (en Oktobro 2020), kaj kiu disponigas al tiu komunumo vastan kolekton de materialoj kaj informoj pri instruado de Esperanto. Pro la grupa instigo, jam ĝi registras ankaŭ kursojn pri Esperanto faratajn en universitatoj tra la mondo. Nun la projektoj kaj la laboroj de ĉi tiu nova iniciato pri "Esperanto en la universitato" estas multaj. Ĝi esence funkcias laŭ la principo *Floru Cent Projektoj* kaj poste ni vidos, kiuj estos la sukcesaj. Laŭ kelkaj la plej grava projekto estas ĉiam la multigo de kursoj pri Esperanto en universitatoj. Instruado de Esperanto estas kaj restas nia ĉefa devo kaj celo. Kaj se ni ne instruas ĝin, ĉio cetera estas ornamaĵoj. Certe ankaŭ scienca esplorado pri Esperanto estas grava, sed plimultigo de universitatoj, kiuj parolas Esperanton, estas antaŭkondiĉo por tio.

Aliflanke homoj ne lernos Esperanton, se ili ne havas kialon. La plej sukcesa maniero vekti la intereson eble estas prezenti Esperanton nature, ne per paroladoj pri la bonaĵoj de la lingvo. Nature signifas, ke universitatoj devas renkonti Esperanton en normalaj universitataj agadoj.

Ekzemple, la Fakultato pri Filologio en la Universitato de Seviljo, kie Vicente Manzano-Arrondo, unu el la membroj de la laborgrupo, laboras,

havas klaran kontraŭemon al Esperanto. En tia etoso, tamen, la universitato akceptis projekton pri lingvaj problemoj en Afriko prezentatan pere de Esperanto. Kvin afrikaj esperantistoj realigis tiun projekton, kie ili skribis pri la lingvo-politika situacio en siaj landoj kaj registris filmetojn pri la sama afero. Oni alvokis publikon kadre de la projekto kaj aranĝis kvin sesiojn. En ĉiu el ili oni babilis kun afrikanoj. Homoj sentis sin instigataj partopreni kiel publiko en tiu projekto, ĉar ili scivolemas pri Afriko kaj ĝiaj lingvoj kaj lingva politiko. Sed ili renkontis Esperanton survoje, ĉar la lingvo de la filmetoj kaj de la internacia babilado estis Esperanto. Vicente agis kiel samtempa interpretisto kaj tradukis ankaŭ la tekstojn en la hispanan, tiel ke oni povis eldoni dulingvan libreton. Neniu afrikano prelegis pri Esperanto nek vendis ĝin nek ofertis ĝin. Oni nur uzis la lingvon kaj nature la publiko scivolemis. Nun, du jarojn poste, tri profesoroj de tiu fakultato kaj profesorino pri antropologio kaj kelkaj studentoj de finaj jaroj kune laboras defendante Esperanton en la universitato, kaj oni starigis teamon pri lingva justeco. Ĉio alvenis de tiu sperto. Kaj post tio Angela prezentis Elisée al la teamo, kiu respondecas pri *Decolonial Subversions* ĉe Universitato de Londono *SOAS* <http://decolonialsubversions.org/partners.html>, kaj oni akceptis lin kiel lingvan partneron. ESF donis malgrandan subvencion por starigo de la retejo – do nia laboro atingis eksteran universitaton.

Kvankam estus pluraj ekzemploj, ĉi tio sufiĉas por montri la bezonon prezenti praktikajn eblojn uzi la lingvon. Ĉiuj menciitaj laboroj jam okazis en Esperantujo. Sed en la komenco al la labor-grupo mankis scio pri tio. Unu el la unuaj celoj de la teamo ILEI-ESF estis realigi kaj kompletigi inform-bazojn. Tio estis la unua projekto de la laborgrupo, kiu donis rezultojn en la formo de listo daŭre longiĝanta pri esperantistoj laborantaj en universitatoj, https://uea.org/vikio/Listo_de_universitataj_instruistoj_kaj_esploristoj,_kiu_j_konas_Esperanton kaj, kunlabore kun TEJO de studentaj kluboj kaj kernoj de kluboj en universitatoj tra la mondo: <http://esfacademic.org.user.s401.sureserver.com/network/>. Poste la grupo komencis registri la kursojn, kiuj okazas en universitatoj kaj ili nun havas apartan rubrikon en www.edukado.net.

Do, legantoj, kiuj scias pri io rilate al Esperanto en universitatoj, bonvolu informi la labor-grupon ĉe la adreso esperanto.en.universitatoj@gmail.com. Krome oni starigis kontakto-liston, universitato@groups.io, kiu nun havas pli ol 100 membrojn, kiuj ankaŭ renkontiĝas en retkunvenoj per la programo Zoom, la filmoj estas ĉe: <https://www.espero.ir/eo/category/kunpensigado/>.

Lastatempe la grupo sukcesis starigi kontaktojn kun universitatoj en

Ĉinujo kaj en aliaj mondopartoj kaj provas helpi la starigon de kursoj en Afriko. En pluraj ĉinaj universitatoj oni havas kursojn pri Esperanto kaj ni eksciis de alia afrika membro de la teamo, ke estas agadoj pri Esperanto en afrikaj universitatoj, kiel ekzemple en Universitato de KvaZulu-Natalo kaj en Univeristato de Durbano. Nuntempe estas aparta iniciato en Kongo: Universitato *Espoir* (Universitato Espero de Kongo), en Baraka, kiu volas starigi kursojn pri interlingvistiko kaj Esperanto. Temas pri projekto, kiun la labor-grupo sekvas kun intereso.

Same en Suda Ameriko estas universitatoj kun kursoj pri Esperanto. En Federacia Universitato de Paranao (UFPR, Kuritibo, Brazilo), estas jam tradicio pro la laboro de Prof. Geraldo Mattos, kiu estis membro de Akademio de Esperanto de 1970 ĝis sia forpaso en 2014 kaj ĝia prezidanto inter 1998 kaj 2007. Kursoj de Esperanto (plurnivelaj, inkluzive de instruista trejnado) estas disponigataj al la komunumo (interna kaj ekstera) ekde 2005, kadre de la por-komunuma agado de la universitato. Tiujn kursojn ekde 2009 gvidas/kunordigas Ivan Eidt Colling, kiu finis Interlingvistikajn Studojn en Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando) en 2014, kaj antaŭ du jaroj translokiĝis al la Grupo de Polistiko de la Departemento pri Polistiko, Germanistiko kaj Klasika Filologio. Ĉi-jare estis akceptitaj liaj proponoj pri nedevigaj lernobjektoj *Esperanto 1*, *Esperanto 2* kaj *Interlingvistiko* por la filologiaj kursoj (la unua disponigo de ĉi-lasta lernobjekto okazis inter Julio kaj Septembro).

El Eŭropo venas alia ekzemplo, tiu de Martin Ptasiński, kiu laboras en Frankfurto. Li klarigis en intervjuo al Katalin Kováts, ke li vidis, ke en la lingvokursa centro de la universitato oni proponas multajn lingvojn kaj ankaŭ la germanan gestolingvon. Li proponis Esperanton kaj la propono estis akceptita. Do, laŭ li, la afero estas relative simpla, kvankam pli malfacile estas varbi lernantojn.

Per tio ni revenas al la tasko multigi kursojn en universitatoj, kio estas pli rekte tasko de ILEI. De post la Kongreso de ILEI (VEKI) kaj la Virtuala Kongreso de Esperanto (VOKO), kaj sekve al ĉiuj diskutoj, kiuj dum ili okazis, ni decidis starigi retejon ESF Academic/ESF Akademia por kunligi en unu loko ĉiujn informojn pri niaj universitataj agadoj, kiuj ne jam troviĝas en aliaj retpaĝoj: <http://esfacademic.org/eo/hejmo/>. La celo estas servi kiel fokuso por niaj agadoj kaj ilin prezenti al la ekstera mondo. Parto de tiu laboro estas peti universitatajn registri mallongajn filmojn pri siaj agadoj kaj esploroj – cifereca maniero plenumi nian unuan taskon, pri kio ni parolis supre, krei inform-bazon.

Estus erare supozi, ke la grupoj nur parolas, kaj ne agadas. Efektive estas la malo – kaj dum ni verkas ĉi tiun artikolon, ni povus listigi plurajn 'florojn', kiuj burĝonas laŭ la principo, kiun ni antaŭe citis: *Floru Cent Projektoj*. Ke oni ne nun parolas pri ili, estas ĉar tiuj 'floroj' bezonas multe da nutrado por krei firmajn radikojn, alie ni laborus vane. Kion vi aŭdis en la prezento dum VEKI, tio estas do nur parto de nia laboro, kaj egale gravas tio, kio ne estis dirita.

Interlingvistiko kaj esperantologio en la universitata Esperanto-centro en Ukrainio

de Nina DANYLYUK (Ukrainio)

Resumo. La artikolo temas pri la universitataj fakultativaj kursoj pri interlingvistiko kaj esperantologio en la E-centro en Lesja Ukrainka Orienteŭropa (Volinia) Nacia Universitato (Ukrainio), kiuj estas instruataj de profesoro Nina Danylyuk ekde la jaro 2015. Estas uzataj la scienc-metodikaj materialoj, kiuj troviĝas en la centro. La artikolo estas dediĉita al la 20-jara jubileo de la ukraina sekcio de ILEI kaj al la 5-jara jubileo de la universitata E-centro.

Ŝlosilvortoj: interlingvistiko, esperantologio, fakultativa kurso, Esperanto-centro, Lesja Ukrainka Orienteŭropa (Volinia) Nacia Universitato.

1. El la historio de miaj studoj pri E kaj interlingvistiko

Jam pasis 36 jaroj, dum kiuj mi laboras kiel universitata instruistino, nuntempe doktoro pri filologiaj sciencoj kaj profesoro. Mi komencis instrui en mia *Alma Mater* en Taras Ŝevĉenko Kijiva Nacia Universitato, kie profesoroj Andrij Bilecjkij kaj Viktor Koptilov subtenis la projektojn de la planitaj internaciaj lingvoj (en la jaro 1958 en la universitato funkciis kurso „Ido kiel plibonigita Esperanto”). Tie mi, danke al mia amikino Olga Kerziouk, studis Esperanton, uzante la lernolibron por hungaroj de István Szerdahelyi „Esperanto 1”, „Esperanto 2” (1966, 1968) kaj la vortarojn por rusoj „Rusa-Esperanta vortaro” (1966) „Esperanta-Rusa vortaro” (1971), ĉar la ukrainajn ni tiutempe ne havis³. En Kijivo mi konatiĝis kun la fama

³ En la mezo de la 30-aj jaroj de la 20-a jc. Esperanto en Soveta Unio estis proklamita „lingvo de etburĝaro”, multaj esperantistoj estis viktimoj de la reprezalioj de Stalin. En Ukrainio estis mortigitaj esperantistoj, kiuj subtenis la ukrainan nacian kulturon

tradukistino Nadija Andrianova-Hordijenko, kiu malkovris al ni la blindan ukrainevenan esperantiston Vasil Eroŝenko, tradukis el Esperanto liajn verkojn kaj al Esperanto verkojn de la ukrainaj klasikuloj Taras Ŝevĉenko kaj Lesja Ukrainka, popolajn fabelojn, popolajn ukrainajn kantojn, verkis multajn scienc-popularajn artikolojn k.a.

Post konatiĝo kun la esploroj de la sovetiaj interlingvistoj Evgen Bokarev, Magomet Isajev, Viktor Grigorjev k.a. (la membroj de la sekcio pri interlingvistiko en Akademio de Sciencoj de Soveta Unio en la 60-80-aj jaroj de la 20-a jc.), de interlingvistoj de la 70-80-aj jaroj: Sergej Kuznecov (Miĥajlo Lomonosov Ŝtata Universitato, Patrice Lumumba Universitato de Amikeco inter Popoloj, Moskvo, Rusio), Paul Ariste kaj Aleksandr Duliĉenko (Universitato en Tartu, Estonio), Orest Tkaĉenko (Akademio de Sciencoj, Kijivo, Ukrainio) k.a., mi komprenis la bezonon organizi universitatajn kursojn pri interlingvistiko en Ukrainio. Tre gravis, ke en la jaro 1989 estis fondita Ukraina Esperanto-Asocio, en la jaro 1991 Ukrainio fariĝis sendependa kaj en la jaro 2000 aperis ukraina sekcio de ILEI, do, eblis agadi kadre de oficialaj organizaĵo⁴. Tamen necesis daŭre kontraŭstari la disvastigitajn sovetiajn kaj postsovetiajn antaŭjuĝojn de sciencistoj kaj universitatoj pri Esperanto kiel danĝera, primitiva kaj mortanta lingvo kaj montri, ke ĝi estas sukcesa projekto de planita lingvo, havas siajn kulturon, literaturon, movadon, ke multaj konataj sciencistoj, instruistoj, ĵurnalistoj k.a. talentaj homoj okupiĝadas pri ĝi⁵.

2. La kursoj pri interlingvistiko, esperantologio kaj E-eventoj en la universitato

Kiam en la jaro 2011 ni fondis en Lesja Ukrainka Orienteŭropa Nacia Universitato (nun – Lesja Ukrainka Volinia Nacia Universitato) la katedron pri romanidaj lingvoj kaj interlingvistiko, mi komencis instrui la specialajn kursojn „Ĉefaj aspektoj de interlingvistiko”, „Interlingvistika aspekto de

kaj internaciajn rilatojn – en la tiel nomata „disfapita Renesanco” (ekz. Eŭgeno Miĥalskij). Pri tio skribis J. Klimenko en doktoriĝa disertacio kaj la monografio, rigardu la referencliston: Юлія КЛИМЕНКО (2017). Renovigo de la E-movado kaj studoj pri Esperanto eblis nur ekde la 60-aj jaroj de la 20-a jc. Pro tio malmultis Eo-lernolibroj, vortaroj, Eo-rondoj k.t.p.

⁴ Pri la historio de la E-movado en Ukrainio rigardu: Володимир ПАЦЮРКО [pacjurko] (2015).

⁵ Pri persekutoj kaj antaŭjuĝoj kontraŭ esperantistoj rigardu: Ulrich LINS (1988), Claude PIRON (1980).

Esperanto”, kaj „Artefaritaj lingvoj kaj interlingvistiko”. La 3-an de aprilo de la jaro 2015 en la ĉefa konstruaĵo de la universitato en la fakultato de eksterlanda filologio estis fondita la unua en Ukrainio Universitata Centro de Esperanto. En la solenaĵo partoprenis: vic-rektoro, profesoro Anatolij Cjosj, vic-rektoro Serhij Fedonjuk, la tiama UKrEA-prezidanto Eŭgeno Kovtonjuk, la popola aktorino de Ukrainio, profesoro de P. I. Ĉajkovskij Nacia Arta Akademio de Ukrainio Eŭhenija Basalajeva, instruistoj kaj studentoj de la universitato, la membroj de la E-klubo „Arbara kanto”, la operatoro de la televida kanalo „Rosa-TV” Roman Ĉihrinecj, ĵurnalistoj kaj fotokorespondantoj de la gazeto „Nia universitato”. Do, tio estis gravega atingo⁶.



*Dum la malferma ceremonio:
en la unua linio sidas Eŭhenija Basalajeva kaj Eŭgeno Kovtonjuk*

Mia nuna kurso por la magistriĝantoj en la fakultato pri eksterlanda filologio nomiĝas „Artefaritaj lingvoj kaj interlingvistiko”. Ĝi konsistas el 24 lecionaj horoj (12 lekciaj) kaj 12 praktikaj horoj (6 praktikaj lekciaj). Ni parolas pri uzo de la naciaj lingvoj kiel internaciaj komunikiloj en diversaj tempoj kaj en diversaj landoj, pri multaj projektoj de artefaritaj lingvoj (la plej detale,

⁶ Proksimume en la sama tempo en la universitato aperis aliaj kulturaj centroj. Interese, ke en najbaraj ĉambroj troviĝas la centroj de la arabaj lingvo kaj kulturo, de la brita kulturo, de la francaj lingvo kaj kulturo, de la kanada kulturo, de la svedaj lingvo kaj kulturo k.a.

kompreneble, pri Esperanto), pri la nuntempa problemo de internacia, interkultura, interreligia komunikado en la situacio de tutmondiĝo. Kutime en la kurso partoprenas entute 20-50 magistriĝantoj. Fine de la kurso la magistriĝantoj prezentas diversajn lingvajn projektojn (laŭ elekto), ni preparolas iliajn pozitivajn kaj negativajn trajtojn. Kelkajn lecionojn mi nepre dediĉas al Esperanto por konatigi filologojn kun ĝia fonetika, morfologia, sintaksa sistemo, kaj leksikaj fontoj. Miaj kursfinintoj povas legi simplajn tekstojn en Esperanto kaj kompreni ilin, sinprezenti kaj iomete dialogi en la internacia lingvo. Tio helpas konvinki ilin, ke la artefarita lingva sistemo bone funkcias. Mi rakontas pri scienca literaturo en la kampo de interlingvistiko kaj esperantologio, pri lernolibroj kaj vortaroj, pri originala kaj tradukita beletra literaturo, pri revuoj kaj gazetoj, E-radioj, diversniveleaj organizaĵoj, renkontiĝoj, kongresoj, konferencoj k.t.p.

Krome, mi kutime organizas fakultativan kurson por dezirantoj studi Esperanton, en kiu partoprenas proksimume 10-20 studentoj kaj magistriĝantoj el diversaj fakultatoj (bedaŭrinde la ĉi-jara pandemio ne donis eblojn por varbi kaj lanĉi ĝin).



La magistriĝantoj, kiuj partoprenis la kurson pri interlingvistiko en la jaro 2018

Ni fondis la E-centron por okazigi ne nur lecionojn, sed ankaŭ por organizi sciencajn rondajn tablojn, konferencojn, seminariojn, kaj la kunsidojn de la E-klubo „Arbara kanto”. Dum kvin jaroj jam okazis multaj eventoj. Mi kiel estro planas kaj kun la helpo de miaj kolegoj kaj klubanoj

efektivigas la laboron de la E-centro. La studentoj de miaj specialaj kursoj nepre partoprenas en ĉio, kion ni organizas en la centro.

Tamen la problemo estas, ke ili finas la studojn, foriras kaj mi komencas instrui denove la sekvan generacion. Nur parto restas en la E-movado, sed almenaŭ ili scias pri la projektoj de planitaj lingvoj kaj konscie taksas la problemon de internacia lingva kaj interkultura komunikado.

La estraro de la universitato bone rilatas kun la Esperanto-centro. Por fondi ĝin ni kun la eks-prezidanto de Ukraina E-Asocio Eŭgeno Kovtonjuk kaj la prezidanto de Lucjka E-klubo, Niko Voloŝin renkontiĝis kun la tiama rektoro Ihor Kocan kaj la dekanino Oksana Rohaĉ por konvinki ilin pri la utilo de la afero. La nuna rektoro Anatolij Cjosj partoprenis en la malferma ceremonio kaj li vidas la rezultojn de nia laboro. Ekzemple, jam okazis sukcesaj sciencaj rondaj tabloj: „Funkciado de la internacia lingvo Esperanto kaj ĝiaj studoj” (2015), „Novaj metodoj de la instruado de la gepatraj kaj fremdaj lingvoj kaj literaturoj” (2016, 2019), „Ni semas kaj semas...” (2017, dediĉita al la 100-jara mortodatreveno de Zamenhof) k.a.

Ni efektivigis kelkajn internaciajn sciencajn konferencojn kun la titolo „Interagado de la etnaj kaj la planitaj lingvoj en la kunteksto de la Eŭropa integriĝo” (2015, 2019), al kiuj aliĝis multaj konataj sciencistoj el diversaj landoj. Kutime ukrainaj esperantistoj (Eŭgeno Kovtonjuk, Oleksandro Hriŝĉenko, Sergeo Ŝmatkov, Andreo Jankovskij k.a.) partoprenas en la eventoj. Krome, nin vizitis eksterlandaj esperantistoj: Stefan MacGill (Hungario/Novzelando)⁷, Kristoforo Sliwinski (Pollando), Yoichi Arai (Japanio), Mikaelo Lineckij (Izraelo), Manfred Kirsch (Germanio) k.a. Ili prelegis por la studentoj en la naciaj lingvoj kun E-tradukoj (se estis bezonate).

Esperanto helpas efektivigi la internacian sciencajn projektojn „Lesja Ukrainka en la mondo de tradukoj”, kiun mi estras. Ĝi estas tre grava por nia universitato, ĉar la mondfama verkistino naskiĝis en la Volinia regiono, loĝis en la urbo Lucjk, la universitato portas ŝian nomon kaj en la jaro 2021 ni festos la 150-jaran jubileon. Kiel rezulto de la unua periodo de la 5-jara laboro estis eldonita lernolibro kun la sama titolo, kiu kunigis la tradukojn de la verkoj en la angla, la germana, la franca, la hispana, la pola, la rusa

⁷ Pri la vizito de Stefan MacGill al Ukrainio en la jaro 2015 kaj al la Lesja Ukrainka Orienteŭropa Nacia Universitato rigardu Estraran Komunikon EKO-n 2015, n-ro 44 kun la fotoj.

lingvoj kaj E (Kijivo, 2019). Nun ni okupiĝas pri la dua parto de la projekto kaj nova lernolibro, kiu enhavas la tradukojn en la serba, la ĉeĥa, la litova, la itala, la kartvela, la sveda, la araba, la bengala, la hindua kaj la ĉina lingvoj. Por sukcesigi ĝin mi uzis la helpon de miaj Esperantaj konatoj kaj instruistoj el diversaj universitatoj de la mondo: Aida Ĉiĝikaitė el Litovio, Davide Astori el Italio, Ahmad Mamdoohi el Irano, Mikaelo Lineckij el Izraelo, Kalle Kniivilä el Svedio, Ilona Koutny el Pollando⁸ k.a.



La instruistinoj de la universitato, kiuj preparis kaj eldonis la lernolibron „Lesja Ukrainka en la mondo de tradukoj” (2019), dum ĝia prezento

3. La materialoj por instruado kaj sciencaj studoj en la E-centro

Ni havas bonajn materialojn por instrui en la kursoj pri interlingvistiko, esperantologio kaj studi E-n: la lernolibrojn de kelkaj aŭtoroj (Věra Barandovská-Frank, Sergej Kuznecov, Aleksandr Duliĉenko, Detlev Blanke, Wim Jansen k.a.), diverslingvajn lernilojn (en la ukraina, la rusa, la angla, la germana, la itala, la franca kaj E), vortarojn (inter ili „Ukraina-E vortar-minimumo” (1998) kaj „Granda Esperanta-ukraina vortaro. Ĉirkaŭ 100 000

⁸ Danke al d-rino Ilona Koutny en la jaro 2008 mi finis la 3-jarajn Interlingvistikajn Studojn en la universitato de Poznano, Pollando, kaj ricevis la Atestilon, kio helpis lanĉi interlingvistikajn kursojn en mia universitato en Ukrainio.

vortoj kaj vortkombinoj” (2015) – de la aŭtoro Volodimir Pacjurko⁹). En la kolekto de la E-centro estas raraj libroj: „Весь язык эсперанто („La tuta lingvo Esperanto)””, kompilita de A. Saĥarov (1918), „Эсперанто-Русский словарь („Esperanta-Rusa vortaro)””, kompilita de V. Sutkovoĵ (1929), „Originala verkaro” de L. L. Zamenhof (1929), „Esperanto por infanoj” de G. Gladstone Solomon (1934), „Leteroj de L.-L. Zamenhof” en 2 volumoj, komentitaj de prof. G. Waringhien (1948), „Esperanta Antologio. Poemoj 1887-1957”, redaktita de William Auld (1958), „Plena vortaro de Esperanto kun Suplemento”, verkita de prof. E. Grosjean-Maupin (1964) k.a.. Parton de ili donacis Ihor Drul, la veterano de la Lucjka E-klubo, kaj tradukisto, kiu preparis la vortarojn de ukrainaj kaj E-proverboj, parton – aliaj esperantistoj. Ni havas multe da beletraj verkoj, originalaj kaj tradukitaj, eldonitaj en diversaj landoj. Interalie, Ukraina E-Asocio komencis publikigi la serion de la ukrainaj klasikuloj (jam aperis tradukitaj en E-verkoj de Taras Ŝevĉenko, Ivan Franko, Lesja Ukrainka). En la E-centro estas la libroj, tradukitaj el E al la ukraina lingvo: verkoj de Ludoviko Zamenhof, Vasil Eroŝenko, „Verda Antologio” (preparis Viktor Pajuk) k.a.. En la kolekto estas E-revuoj, bultenoj kaj gazetoj: „Heroldo de E”, „Esperanto”, „Juna Amiko”, „IPR”, „Informilo por Interlingvistoj”, „Literatura foiro”, „Monato”, „Sennaciulo”, „Ukraina stelo”, „Helianto” k.a..

Por efike instrui mi preparis la programojn de la kursoj por studentoj, magistriĝantoj kaj lernantoj. Ni povas uzi komputilon, tabulon, afiŝojn, donacojn el multaj landoj k.a.. Niko Voloŝin, la prezidanto de la Lucjka E-klubo, pentristo, ĵurnalisto kaj eldonisto, bele ornamis la centron, publikigis gravajn librojn, dum multaj jaroj prizorgis la informilon de UkrEA nomatan „Helianto”¹⁰. Do, danke al esperantistoj el la tuta mondo, ni daŭre laboras kaj okupiĝos pri novaj projektoj.

Bedaŭrinde pro la pandemio ni ne povas ĉeeste festi la 5-jaran jubileon, sed planas renkontiĝi post la kvaranteno por rememori niajn plej interesajn eventojn kaj paroli pri estonta agado. Ni kredas, ke la centro de Esperanto havas bonan perspektivon laŭ la scienc-esplora, kleriga kaj instru-metodika vidpunktoj.

⁹ Eblas uzi la retan varianton: http://ukrainio.org.ua/vortaro/Vortaro_de_Pacjurko.pdf

¹⁰ Pri studoj kaj instruado de E en Ukrainio eblas rigardi la artikolon: Ніна О. ДАНИЛЮК (2019).

REFERENCOJ

- Ulrich LINS (1988). *La danĝera lingvo*. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto. Moskvo: Progreso.
- Claude PIRON (1980). La psikologia rezisto al la Lingvo Internacia. *Heroldo de Esperanto*, 1980, n-or 1666-1668. Traduko en la ukrainan lingvon de V. Hurtovenko: Клод ПІРОН (2016). *Психологічний спротив міжнародній мові*. Київ: ПКЦ «Есперанто».
- Володимир ПАЦЮРКО (2015). З історії есперантського руху в Україні. В: Володимир Пацюрко (2015). *Великий есперантсько-український словник*. Близько 100 000 слів та словосполучень. Львів, с. 2–8 [Volodimir PACJURKO (2015). El la historio de esperantista movado en Ukrainio. En: Volodimir Pacjurko (2015) *Granda Esperanta-ukraina vortaro. Ĉirkaŭ 100 000 vortoj kaj vortkombinoj*, p. 2-8].
- Ніна О. ДАНИЛЮК (2019). Наукове вивчення і викладання есперанто в Україні у ХХ – на початку ХХІ століття. *Науковий вісник Східноєвропейського національного університету імені Лесі Українки: Філологічні науки. Мовознавство*. № 10. С. 34-40 [Nina O. Danylyuk (2019). Sciencaj studoj kaj instruado de Esperanto en Ukrainio en la 20-a – komence de la 21-a j.c. *Scienca heroldo de Lesja Ukrainka Orienteŭropa Nacia Universitato. Filologiaj Sciencoj. Lingvistiko*, n-ro 10, p. 34–40] (en la ukraina lingvo).
- Юлія А. КЛИМЕНКО (2017). *Розвиток есперанто-руху в Україні (кінець ХІХ – середина 30-х років ХХ століття)*. Умань: Видавець «Сочінський М. М.» [Julija A. KLIMENKO (2017). *Disvolviĝo de E-movado en Ukrainio (fino de la 19-a – mezo de la 30-aj jaroj de la 20-a jc.)*. Umanj: Eldonisto „Soĉinsjkiĵ M. M.”] (en la ukraina lingvo).

Biografio de la aŭtorino



Nina Danylyuk esperantistiĝis en 1977 en Kijivo (Ukrainio). Ŝi estas la aŭtoro de 190 sciencaj laboraĵoj en la kampo de lingvostilistiko, leksikologio, etnolingvistiko, lingvokulturologio, interlingvistiko k.a.. Dum la jaroj 2000-2009 kaj 2015-2020 Nina Danylyuk estis estro de la ukraina sekcio de ILEI. Ŝi partoprenis en la internaciaj projektoj pri interkulturo, multaj ILEI-konferencoj kaj ILEI-kongresoj, UK-oj, metodika seminaro en IEI (2008, Hago) k.a..

Adreso por kontaktoj: Lesja Ukrainka Volinia Nacia Universitato, Prospekt Voli 13, u. Lucjk 43026, Ukrainio; nina.danylyuk@gmail.com.

Ses difinoj serĉantaj fakon: interlingvistiko en la nova jarmilo

Federico GOBBO (Universitato de Amsterdamo)

Resumo

La kontribuo celas prezenti la esencon kaj estontecon de la plej malortodoksa branĉo de lingvistiko, t.e. interlingvistiko, per teoria aliro. Oni proponas trarigardon al la fako per panorama superrigardo tra la ses difinoj donitaj fare de fakuloj ekde la kreo de la vortigo en la franca fare de belga esperantisto Jules Meymans en 1911 ĝis la ekstarigo de la bita epoko, rande de la fino de la dudeka jarcento. Oni povas vidi, ke la teoria diskuto ne estas sen praktikaj konsekvencoj: unue, la pozicio de interlingvistiko dependas de la kultura kaj universitata fonoj, en kiuj ĝi situas; due, la transformiĝo de lingvistiko tratempe kaj traloke ĝenerale neeviteble influas interlingvistikon profunde kaj larĝe; laste sed ne balaste, la fina lokiĝo de interlingvistiko difinas la enkadrigon de Esperanto kaj ĝian allogon fare de la studentoj, kiuj eventuale volus specialiĝi en la fako. Ne estas definitiva solvo por doni firmecon al interlingvistiko, ĉar ekzistas diversaj skoloj, kies aliroj tre diversas kaj multflanke nekongruas, kaj finfine, tio riskas malfortigi la fakon mem. La kontribuo donas konkretan proponon por adapti la fakon al la nova jarmilo, kun alvoko por alproprigo fare de la koncernaj homoj, kiuj okupiĝas pri ĝi en la diversaj universitataj kunteksto.

Anoncoj

Frukto de VEKI

Okaze de VEKI Ahmad Reza Mamduhi lanĉis la ideon havi servon por trovi prelegantojn kaj instruistojn. La ideo estas brila. Mi ekrilatis kun la homoj de EventaServo kaj jen la nova servo funkcias.

Bv viziti la paĝon https://eventaservo.org/instruistoj_kaj_prelegantoj. Ankaŭ en la ĉefpaĝo de la EventaServo vi tuj vidas ĝin: <https://eventaservo.org/> (en la dua linio vi povas alklaki ĝin).

Bv aliĝi mem kiel preleganto kaj/aŭ instruisto!

Mirejo GROSJEAN

FORLAFLATADO

LERNU PRELEGI EN 10 SIMPLAJ PAŜOJ



retkurso

forlaflatado.com/retkurso-flf
Uzu la kuponon IPR10 kaj
ricevu 10% da rabato!

La plej tikla parto de preleg-arto estas ne tio, kiel preleganto sintenas, movas la brakojn kaj simile, sed prepari prelegoplanon. Sen taŭga plano ekzistas du eblaj rezultoj: aŭ vi bedaŭras ne esti dirinta kion vi deziris diri, aŭ vi bedaŭras esti dirinta tion, kion vi ne devintus diri. Skanu la QR-kodon kaj ekkonu la retkurson #forlaflatado. Entute 12 lecionoj, kiujn vi povas trarigardi kiam ajn, kiom da fojoj vi deziras. Lernu prelegi en 10 simplaj paŝoj.

EKO apartenas ankaŭ al ILEI

La informilo nomita EKO spertas signifan rekreskon en 2020, maldank' al la pandemio, kiu skuis la tradician mondmigrigan emon de esperantistoj, kaj devigis la popolon al virtuala kunvenado. Same la AMO-programo post la ĉeesta seminario 62 en Aŭklando, Nov-Zelando (aldono de la kvina kontinento), devis fariĝi virtuala por la seminarioj 63 ĝis 69. En tiu La EKO-komunikoj montris falan tendencon post la komencaj du plenaj jaroj, kiam aperis 52 komunikoj, unu ĉiusemajne. La intenco de la pretiganto estis lasi tiun falon kaj iom post iom retiriĝi el la grandaj preparlaboroj. Sed la pandemio ŝanĝis ĉion, kaj la serio en 2020 jam atingis la 50-an jubilean numeron, kaj ĝis la jarfino kredeble aperos pli ol 60 komunikoj. Jen la jaraj sumoj ekde 2013: 2, 52, 52, 40, 36, 25, 17 kaj 50 ĝis nun. En la bildo, la ruĝa linio montras la jarkomencajn intencojn, la nigra la virus-inspiritan realon. Tiu atingo apartenas al ILEI, same kiel al UEA. La komunikiloj regule diskonigis informojn kaj alvokojn de la Ligo. Tio plene harmonias kun la celo de la serio: subteni la lokan, landan, regionan kaj fakan agadon. La sorto de EKO en 2021 restas malcerta kaj ĉefe dependas de la pluvivemo de la viruso kaj kvarantenoj. Same la estonto de la AMO-programo malcertas. Tiu,


kiu prizorgis persone ĉiujn naŭ seminariojn ekde 2020 ne plu havas la fortojn prizorgi mem pli ol kvar seminariojn en 2021. Jam disiris al la Komisiono de la AMO-programo, ke ĝi aktiviĝu kaj ekprizorgu kelkajn seminariojn. Inter la komisionanoj estas reprezentanto de ILEI. La alvoko estas do, ke ILEI prizorgu almenaŭ unu seminarion en 2021 pri eduka temo.

Stefan MACGILL

Tri juveloj

Eble en via kulturo alvenas Kristnaskfesto kun donacoj kaj/aŭ Novjaro kun donacoj. Por ni instruistoj alvenas en ĉi tiu jarfino tri juveloj.

Nova eldono de **Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko** de Bertil WENNERGREN. Per klaraj frazoj Bertilo prezentas ĉiujn aspektojn kaj tiklajn gramatikaĵojn de nia lingvo. Mendo eblas en la retejo.



La kvara eldono (plene aktualigita kaj signife larĝigita) de la **Manlibro pri Instruado de Esperanto** alvenas. D-ino Katalin KOVATS kun sia teamo

4-a eldono

- + nova aspekto
- + plene revokita
- + duobla amplekso

MANLIBRO pri INSTRUADO de ESPERANTO

La libro, kiun vi havas en viaj manoj, estas rezulto de kunlaboro de plurfaka internacia teamo kun vasta sperto pri Instruado de Esperanto, lingvehistoriistado, esplorado pri lingvoj kaj kulturo, samkiel pri elpensado, verkado kaj eldonado de lernolibroj kaj lerniloj. Multo ŝanĝiĝis en la mondo, en la maniero kiel ni instruis, ekde la apero de la tria eldono de ĉi tiu Manlibro pri Instruado de Esperanto antaŭ dek unu jaroj. Pro tio ĝi estis revokita, distingita, korrektigita ampleksiĝita jaroj. Pro tio ĝi estis revokita, distingita, korrektigita ampleksiĝita jaroj. Pro tio ĝi estis revokita, distingita, korrektigita ampleksiĝita jaroj.

ivan Edjt Colling
Vic-Prezidanto de ILEI
2020

espero

9 783096 093266

Redaktoro: Katalin Kovats

MANLIBRO pri INSTRUADO de ESPERANTO

Edukado@Interreto
Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
Edukado.net

laboradis, laboregis dum la lastaj monatoj, dum la lastaj du jaroj, por produkti aktualigitan ilon por ni, geinstruistoj. Diversaj altnivelaj kontribuantoj partoprenis en tiu kuraĝa entrepreno; provlegantoj per aglaj okuloj altigis la kvaliton de la verko. Konkretaj ĉapitroj pri ĉiuj aspektoj de nia laboro, listo de legindaĵoj kaj vizitendaj retpaĝoj, analizo de lecionostrukturo kaj de instruiloj kaj multaj aliaj utilaĵoj. La *Manlibro* certe estas valorega ilaro kaj efika subteno en nia laboro.

Mendo eblas en la retejo <https://manlibro.ikso.net>.

La tria juvelo ne rekte rilatas al instruado, sed nutros viajn pripensojn kaj prezentas legindajn paĝojn al viaj kursoj por progresantoj. Temas pri **Hector Hodler, pacisma sinteno**. Diversaj aŭtoroj kontribuis al ĝia realigado: Marine ENGLERT, Ulrich LINS, Christian LAVARENNE, Charles HEIMBERG. Temas pri dulingva libro Esperanto-franca pri la fondinto de UEA. Tamen la libro provas prezenti ĉiujn facetojn de tiu altnivela kaj kuraĝa persono, kiu forpasis en la aĝo de 32 jaroj. La libro entenas multajn originalajn dokumentojn kaj pentraĵojn de kaj pri la filo de la fama svisa pentristo Ferdinand Hodler, kaj antologion kun diversaj tekstoj de Hector Hodler. Ekde januaro 2021 la libro estos mendebla ĉe www.amazon.com. Supozeble diversaj libroservoj volos vendi ĝin.

https://eo.wikipedia.org/wiki/Hector_Hodler



MARINE ENGLERT


Hector Hodler

Un engagement pacifiste / Pacisma sinteno

ESTEROS KUBIK

Mireille GROSJEAN

Omaĝe al Zlatko Tišljar – Pajo (1945-2020)



Zlatko Tišljar, karesnome Pajo, naskiĝis en Zagreb la 19-an de majo 1945. Lia edukiĝis pri tekniko en elektroteknika mezlernejo, sed tuj li komprenis, ke la kulturo estas la ĉefa kampo de lia intereso. Li tre frue malkovris vivan kaj sukan Esperanton en Studenta Esperanto-Klubo en 1962 ĉe la franco Roger Imbert kaj eniris la Movadon, komence kiel estrarano de Studenta Esperanto-Klubo, kaj poste kiel sekretario de Kroata Esperanta Junulara Asocio, membro de la prezidantaro de Kroata Esperanto-Ligo kaj Jugoslavia Esperanto-Ligo. Unue kun Roger Imbert li

fondis Pupteatran Internacian Festivalon (PIF) en 1968. Kiel proksima kunlaboranto de Tibor Sekelj kaj lia Instituto por oficialigo de Esperanto el Beograd, li ĉiam zorgis pri Esperanto en praktika apliko. Li fondis la kulturalan entreprenon Internacia Kultura Servo en 1971, en kiu Esperanto estis en la centro de la agado.

Li estis la motoro de la entrepreno ĝis 1991, ĝis la milito en Kroatio. Tiam li translokiĝis al Maribor kaj tie fondis alian kulturalan entreprenon Interkulturo. Esperanto-Societon en Velika Gorica li fondis en 1979. Li estis unu el la plej gravaj kroataj tradukistoj kun la ĉefverko *Rande de l' prudento* de Miroslav Krleža. Redaktoro de la studenta revuo *Jes, sed* kaj de *Tempo* kaj aktoro en la Drama grupo ĉe la aktoro Mladen Šerment, li fariĝis vortaristo, sciencisto kaj Esperanta teoriisto kaj pensulo. Li ne akceptis tradician agadon pri Esperanto kaj ĉiam naĝis kontraŭflue.

Apud la laboro li sukcese diplomiĝis pri la germana, pri ĝenerala lingvistiko kaj informadiko kaj magistriĝis ĉe Akademio Internacia San-Marino. Li lanĉis la lernolibron laŭ la Zagreba Metodo de Esperanto-Instruado bazitan sur esplorado de la frekvenco de morfemoj en la parolata Esperanto. Nuntempe la lernilo ekzistas en pli ol 30 presitaj eldonoj kaj pluraj retaj versioj de ĝi.

Liaj familianoj, la edzino Ruža, la denaske Esperanto-parolantaj du filinoj Maja kaj Danka, la frato Kruno modele subtenis lian Esperantan agadon. Li trovis la forton paroli en Esperanto ankaŭ ĉe sia nepo Lunar. Kie li troviĝis, tie troviĝis Esperantujo.

Kiam Eŭropo malfermis siajn fondaĵojn al Slovenio kaj poste al Kroatio, Pajo estis la unua ĉerpinto el la eŭropaj rimedoj kaj lia fantazio pri EU-projektoj ne haltis ĝis la jaro 2020.

Li estis la plej granda kroata Eŭropano, kiu atente sekvis la evoluon de EU kaj kritikis ĝiajn misirojn konkludante per la libro *Eŭropo, vi baldaŭ mortos*. Kiel sekretario de Eŭropa Esperanto-Unio li nur du monatojn antaŭ la morto ĉesis redakti *Eŭropan Bultenon* post ĝia ducenta numero.

ILEI kaj UEA elektis lin kiel sian honoran membron en la somero 2020. Ŝrumpis la kroata kaj la eŭropa Esperantujo pro lia forpaso. Li mortis la 8-an de septembro 2020 en sia hejmo en Velika Gorica. Aro da sciencaj simpozioj restas post Pajo, samkiel la kursanoj el pli ol cent kursoj!

Spomenka ŠTIMEC

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prez.), Mireille Grosjean (vicprez.), Mónica Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Aristophio Alves Filho.

Kontrolo: Simon Smits, Orlando Raola.

Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: M. Grosjean.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Gong Xiaofeng „Arko”, Goro Kimura, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Radojica Petrović, Kristin Tytgat, Vicente Manzano-Arrondo. Estrare: Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 14)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, info@ikso.net. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: redaktanto@edukado.net.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983, Trejnsejnoj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, zsafia.korody@esperanto.de.

IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la Jarlibron de UEA*

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Unika (Yuro Jung)**.
Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Karina Oliveira**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, www.uea.org. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Duncan Charters**.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE (*Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo*) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**,

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro**.

Unesko (kun statuso de observanto): Rerezentantoj de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@aliceadsl.fr, **Martine Demouy, Max Demouy, Jesper Jakobsen, Josiane Moirand**

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 25 € en A-landoj (laŭ la malnova UEA-difino), 12,50 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. Kun aliro nur al la reta versio de *IPR* membreco kostas 12,50 € por la A-landoj, 6,25 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj. Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan *IPR* kaj paperan *Juna Amiko* (JA). Tio kostas por A-landanoj 40 € kaj por B-landanoj 22,50 €. Abono de JA papera kostas 18 € en A-lando, 13 € en B-lando. Abono de JA reta kostas 11 € en A-lando, 7 € en B-lando. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por JA akceptas abonojn enlande. Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Vilĉjo (Bill) HARRIS, 4 Edgcomb Ct, Portland ME 04013, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Bv klare indiki la celon de via pago. La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 24 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, jozefo.nemeth@gmail.com, www.ilei.info/ipr/; tel: (+36-70) 931-0530.

Peranto de ILEI kadre de LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj): Olena Poshivana, amatalena@ukr.net. La revuo estas rete aŭskultebla por vid-handikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE BEVERWIJK, Nederlando*, moerbeekr@gmail.com.

**Ni fermis la nunan numeron la 31-an de oktobro 2020,
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de januaro 2021.**



Ŝtata elementa lernejo en Barato (vd p. 23)



La partoprenantoj de la scienca rinda tavolo kun la membroj de Lucjka Esperanto-klubo, 2016 (vd p. 40)

